

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



Prof. D-ro Giorgio Canuto, kiu ĵus ricevis la Oran Medalon por la Meritoj en Instruado, Klerigo kaj Artoj.

N-ro 635 (10)

Oktobro 1958

**Universala
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)**

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redakcia adreso: S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964 Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estrarano de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Enhavo

Al 50.000 membroj!	153
Esperanto en U.N. <i>Eskil Svane</i>	153
Al la legantoj	154
Alta honorigo de Prof. D-ro G. Canuto	155
Belarta Konkurso 1959	155
Tiuj versaĵoj... <i>Poul Thorsen</i>	156
Lingva eksperimento en Arnhem (Nederlando)	156
Kiun verbformon uzi? <i>W. P. Roelofs</i>	156
La novaj membroj de la Honora Patrona Komitato	156
Al D-ro Kalocsay. <i>Bérci Darázs</i>	159
Finvortoj de Virino	159
31a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda	160
La Universala Ekspozicio	161
El la Lando Hispanujo	162
Rubrikoj	
Magnetofona Servo de U.E.A.	154
CED	154
La Juna Vivo	157
Radio	160
Novaj Libroj	164
La Internaciaj konkursoj	167
Oficiala Informilo	168

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun larĝa marĝeno maldekstre. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O)

Al 50.000 membroj!

Unueco faras potencon. Mil homoj unuanime agantaj povas fari miraklojn. U.E.A. atingis preskaŭ 30.000 membrojn. Ĝuste nun ekzistas okazo por kolekti ĉiujn fortojn en la strebo atentigi plej vaste la mondon pri la Internacia Lingvo kaj la kulturaj valoroj kreitaj en ĝi. Tiu okazo estas la centjara datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof.

Ĉiu esperantisto, kiu pripensas la valoron de la verko de Zamenhof — mirinda esprimo per kiu estas eble kontakti homojn ĉie en la mondo kaj tiel plivastigi siajn horizontojn — certe sentas sian ŝuldon al la genia modestulo el Bjalistoko. La sola repago de tiu ŝuldo povas ja konsisti en laboro por plua evoluigo kaj disvastigo de lia verko. Tiun laboron faras ĉiu, kiu praktike uzas la lingvon. Sed nun temas pri io pli grava ol skribi kaj paroli Esperanton por propra ĝojo kaj utilo.

La Internacia Organiza Komitato, I.O.K., apelacias al ĉiuj organizoj kaj izoluloj serioze pripensi la metodojn por plialtigo de la membro-nombro. Legu la alvokojn en nia revuo — kaj agu! Por la kampanjo en la Zamenhofa Jaro U.E.A. bezonas ne nur financajn rimedojn, sed ankaŭ multe pli da membroj. La plej efika maniero havigi ilin estas varbado fare de ĉiu organizo kaj unuopulo. Nia strebado celas atingi 50.000 membrojn en 1959. Tio neniel estas utopio, sed afero realigebla.

La varbado de apogantoj estas alia tasko, kiun tre facile povas plenumi absolute ĉiu membro de U.E.A. Ne estas imageble, ke iu ajn esperantisto ne povus trovi inter siaj parencoj kaj gekonatoj almenaŭ 4-5 personojn, kiuj ne estus pretaj doni unu fojon por ĉiam la malaltan kontribuon de nur 5 guldenoj por helpi la disvastigon de Esperanto. La Zamenhofa Jaro prezentas taŭgan okazon por komenci tuj ankaŭ tiun kampanjon.

La du agadoj apartenas al la ĝenerala programo de aranĝoj, akceptitaj de I.O.K. por la festoj okaze de la Zamenhofa Jaro. Ili neniel ŝarĝus la budĝetojn de niaj organizaĵoj kaj membroj. Ambaŭ kampanjoj postulas nur iom da bona volo kaj kompreno, ke por konvene memori la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof U.E.A. devas havi ankoraŭ multe pli da efektivaj membroj kaj moralaj apogantoj.

Kvin dek mil homoj, kun eble 100.000 apogantoj povas facile atingi multe pli gravajn celojn ol tridek mil membroj. La tasko, kiun nun havas ĉiu nia organizaĵo kaj ĉiu unuopulo estas facilega, se ĉiu faras sian devon: tuj pagi sian kotizon por 1959 kaj samtempe varbi kiel eble plej multajn novajn membrojn kaj apogantojn.

Por fari la Zamenhofan Jaron mejloŝtono en la historio de Esperanto ĉiu esperantisto devas senti sian responson kaj, ĉiu laŭ siaj eblecoj kaj povoj — kaj ankaŭ laŭ sia amo al la lingvo — dediĉi dum kelkaj monatoj iom da forto al la realigo de la programo, kies baza celo estas, krom esprimi omaĝon al la aŭtoro de la Internacia Lingvo, ankaŭ konsiderinde disvastigi lian verkon.

Do, ekagu tuj!

ESPERANTO EN U.N.

Du kursojn pri Esperanto starigis ĉe la Unuiĝintaj Nacioj antaŭnelonge tri oficiistoj tieaj, nome s-roj Kersaudy el Francujo, Piron el Belgujo kaj Svane el Danlando. La kursoj estis la rezulto de anoncado en la dusemajna gazeto "Secretariat-News", kiun eldonas la ĉefsidejo de U.N. en Nov-Jorko.

Ambaŭ kursoj daŭros ok semajnojn, kaj instruisto estas s-ro Eskil Svane. La kursojn sekvas entute 30 lernantoj, inter ili pluraj tradukistoj. Kvankam la lernantoj venas el 18 landoj, oni instruas en la angla lingvo, unu el la oficialaj lingvoj de U.N., kaj ne laŭ la Cseh-metodo ĉar oni konsideras ĝin malpli taŭga por tiaj mallongaj kursoj.

Bonvolu noti ke la starigo de Esperanto-kursoj ĉe U.N. neniel signifas oficialan rekonon de tiu lingvo. Tamen multaj UN-oficistoj interesiĝis pri la Internacia Lingvo kaj pri nia movado, kaj ne malgrava estas la fakto, ke la biblioteko de U.N. decidis aĉeti la "Linguaphone" kurson pri Esperanto por pruntedono al oficistoj interesataj.

Post la fino de la kursoj oni esperas fondi UN Esperanto-Klubon, en kiu oni povos kunigi la lernantojn kaj praktiki la lingvon. Tia klubo verŝajne rajtos ricevi subtenon de U.N. kiel la aliaj kluboj tieaj.

Espereble ni povos krei viglan klubvivon kaj venigi multajn elstarajn parolantojn al niaj kunvenoj. Ni intencas kunlabori kun la aliaj UN-klubo, ekz. kun la UN Film-Klubo, kun la Drama Grupo kaj la Klubo Muzika prezentante filmojn, teatraĵetojn kaj kantojn en Esperanto. Plie ni pripensas la eblecon korespondi per sonbendoj kun aliaj Esperanto-klubo, kaj nia plej kuraĝa ideo estas aranĝo de demonstraĵo model-kunveno de unu el la organoj de U.N. Fine ni planas zorge aranĝitan ekspozicion en la ĉefsidejo mem post la fondo de la Klubo.

Ni estas optimistaj pri la estonteco pro la granda intereso, kiun kreis nia anonco. Ni estas certaj, ke saman sukceson facile povos havi Esperantistaj oficistoj laborantaj en la ĉefsidejoj de la specialigitaj agentejoj de U.N., kiel ekz. UNESCO, ILO, WHO ktp, kaj ni insiste petas, ke niaj tieaj kolegoj tuj ekagu simile al ni.

Alvoko: Por la fondo de la UN Esperanto-klubo kaj la starigo de digna ekspozicio en la ĉefsidejo de la mond-organizaĵo ni petas ke kluboj, gazetoj kaj eldonejoj sendu al ni taŭgan materialon laŭ la adreso: S-ro Claude Piron, French Section, United Nations, New York, U.S.A.

K. Z.

Eskil Svane

Magnetofona Servo de U.E.A.

Komisiito : Rüdiger Eichholz & Esperanto Press
Oakville, Ont., Kanado

Dua listo de haveblaj sonbendoj:

7. Poul Thorsen: "Tri nobelpremiitoj en dana literaturo (Karl Gjellerup — Henrik Pontoppidan — Johannes V. Jensen)". Prelego dum S.U. en Kopenhago 1956.
8. Poul Thorsen: "12 poemoj el Rozoj kaj Urtikoj". Voĉlegataj de la aŭtoro kun enkonduko de Kirsten Zacho.
9. Diskutoj kaj voĉdonado pri Esperanto dum la ferma kunsido de la VIII-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Paroladoj en hispana, franca kaj angla lingvoj. Daŭro 10 minutoj.
10. Diskuto pri Esperanto en la Nov-Zelanda parlamento (en angla lingvo). Surbendigita de radio-elsendo. Kun komentario de s-ro D. MacGill.
11. La urbestro de Mainz invitas esperantistojn al la 43-a U.K.
12. J. H. Sullivan: "La Esperanto Movado kaj la Junularo". Parolado surbendigita dum la jarkunveno de la Society of British Esperantist Teachers (4.1.1958).
13. Radioelsendo de radio Sofia: S-ro F. Franceschi parolas pri siaj impresoj en Bulgarujo.
14. C. W. M. Baans: "La vivo de Ĉajkovski" kun muziko de tiu ĉi komponisto. (Surbendigita en kunveno de sekcio "Arnhem" de la Nederlanda Esp. Asoc. "La Estonto Estas Nia", marto 1958).
15. E. Andersson: "Vermlando de Selma Lagerlöf kaj la fabelo de Gösta Berling".
16. E. Andersson kaj B. S. Ågren: "Impresoj pri Italujo". (Surbendigo por radioelsendo de radio Romo).

Geonkloj Esperantistaj

Sub la aŭspicio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.) stariĝis projekto por kuraĝigi kaj helpi al junaj gelernantoj de Esperanto.

S-ro J. H. Sullivan, 3, Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo, akceptis la administradon.

La devoj de la geonkloj estas jene:

- a) Korespondi kun la infanoj kaj amikiĝi kun ili;
- b) Gvidi ilin lingve, korektante iliajn erarojn laŭbezone;
- c) Teni ilian intereson pri Esperanto kaj 'eduki' ilin pri la "Esperanta Komunumo";
- d) Memori Kristnaskon kaj / aŭ la naskiĝtagon, sendante taŭgan donaceton je tiu okazo.

INVITO AL ĈIUJ GESAMIDEANOJ

1) AL PLENAGULOJ.

- a) Proponu vin, kiel onkl(in)o, sendante vian nomon kaj adreson al S-ro Sullivan. Diru kiom da genevoj vi volas akcepti.
- b) Se vi estas patr(in)o aŭ instruist(in)o instigu viajn infanojn skribi kaj peti onkl(in)on.

2) AL INFANOJ. Skribu letereton al S-ro Sullivan kun, se eble, respondkupono, kaj petu onkl(in)on. Diru vian aĝon.

3) AL ĈIUJ, kiuj subtenas la ideon de la skemo. Via financa helpo multe helpas.

Centra Oficejo de I.L.E.I. 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Britujo.

GED

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY,
Middlesex, Anglujo
Telefona ARNold 90-81

STATISTIKO PRI PREMIITOJ EN LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

En 1950 debutis, per Literatura Konkurso, kiu en la posta jaro fariĝis la Belartaj Konkursoj kun propra regularo, la ĉiujaraj konkursoj en la kadro de la Universalaĵ Kongresoj. Ilia celo estas kuraĝigi la verkadon en la Internacia Lingvo. Inter 1950 kaj 1957 (8 jaroj), 34 diversaj verkistoj el 16 landoj ricevis unuan, duan aŭ trian premiojn en la diversaj branĉoj. Pli detala analizo de la rezultoj donas jenajn informojn: 21 diversaj verkistoj ricevis unuajn premiojn; 20 ricevis duajn premiojn; 15 ricevis triajn premiojn. El la 34 premiitoj, 17 unufoje ricevis premion; 9 estis dufoje premiitaj; 4 estis trifoje premiitaj; 1 estis kvarfoje premiita; 3 estis pli ol kvarfoje premiitaj. Oni povas konstati la larĝan bazon de la esperantista kulturo.

AL LA LEGANTOJ

Prezentante jene la unuan numeron de nia revuo, pri kiu ekskluzive ni responsas, ni direktas al la legantoj la plej sincerajn salutojn.

Post la bonega redaktado fare de s-ro William Auld, estas treege malfacila la tasko, kiun ni transprenis. Ni plene konscias, ke malgraŭ la plej bona volo nia kompetenteco kaj ankaŭ niaj ceteraj ebloj por konservi la ĝisnunan nivelon de la revuo estas modestaj. Sed ĉar la Estraro de U.E.A. urĝe bezonis nova(j)n redaktoro(j)n, ni tamen akceptis la redaktorecon (H.V.R. ankoraŭ nur provizore).

Estas nia intenco ĉiel klopodadi por konservi la revuon digna vizaĝo de U.E.A., kaj ni esperas por tio la aktivan helpon kaj kunlaboron de niaj membroj.

Kirsten Zacho. H. V. Rasmussen.

ALTA HONORIGO DE PROF. D-RO G. CANUTO

La Prezidanto de la Itala Respubliko honorigis Prof. D-ron Giorgio Canuto per la "Ora Medalo por la Meritoj en Instruado, Klerigo kaj Artoj". Ĝi estas la plej alta honorigo, kiun oni povas ricevi kiel rekonon por faka, scienca aŭ kleriga laboro sur la kampo de instruado, kulturo kaj artoj. En Italujo oni ĝin kutime donas al la plej meritaj profesoroj okaze de ilia emeritiĝo, kiam ili finas sian karieron. La fakto, ke Prof. Canuto ricevis la Oran Medalon dek jarojn antaŭ la finiĝo de sia universitata kariero, montras la speciale altan aprezon de liaj meritoj por la scienco kaj klerigo.

Prof. D-ro G. Canuto estis profesoro kaj rektoro de la Universitato en Parma. Nun li estas regula profesoro en la Universitato de Torino. Jam pli frue li ricevis la altan ordenon de Granda Oficiro (Gr. Uff.) de la Respubliko. Ekde la jaro 1956 li estas Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

La Ora Medalo estos transdonita al Prof. Canuto en la inaŭgura tago de la akademika jaro, nome en novembro.

Tutkoran gratulon al nia Prezidanto.

BELARTA KONKURSO 1959

Dum mia unua jaro en la funkcio de sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, mi konstatis, ke pro la kompare mallonga tempo-daŭro inter la anonco de la konkurso kaj la limdato por la ricevo de konkursaĵoj, multaj ekstereŭropaj samideanoj ne havis grandan ŝancon partopreni. Kvankam oni ja ricevis konkursaĵojn el Aŭstralio kaj el Sud-Ameriko, oni povus esperi multajn pli.

Konsiderinte tion ĉi, mi opiniis bone fari antaŭavizon kiel eble plej frue pri la Belarta Konkurso, 1959. Plenaj detaloj aperos en la revuo "Esperanto" por novembro, kaj oni petas, ke eventualaj partoprenantoj atentu kaj zorge legu la regulojn tie donotajn, aparte ĉar ili estos iom malsamaj ol la reguloj por 1958. Intertempe, por stimuli al ekverko, la plej kernaj detaloj aperas ĉi-malsupre.

Kiel kutime, la literatura sekcio konsistos el kvar fakoj :

1. *Originala poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
2. *Tradukita poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
3. *Originala prozo* (novelo, eseo, artikolo, aŭ simile; ĉiu prozaĵo po 2.000-3.000 vortoj).
4. *Originala drameto* (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radia dialogo; maksimuma ludodaŭro, 25 minutoj).

Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 44-a Universala Kongreso, aŭ kiu estas individua membro de UEA. La limdato por ricevo de konkursaĵoj ĉe la adreso donota en la novembra numero de ĉi tiu revuo estas la tria de majo, 1959.

Gerald C. Jervis, Sekretario.

Tiuj versaĵoj . . .

Ekzistas homoj, kaj certe ne malmultaj, kiuj neniam tuŝas eĉ per la okuloj versojn. Ili trovas tiun sentoplenan ludon per vortoj nedigna, nekomprenbla aŭ eĉ ridinda. Ili bezonas edukon, sed tiun oni — mirinde — nur tre pene povas ekhavi, ĉar instruon pri metriko, ritmo, rimado, adasismoj, apostrofigo ktp. neni" donas en la esperanto-movado. Jen — ravaĝa tasko por redaktoroj, recenzistoj, poetoj kaj aliaj kulturlaborantoj.

Krom la nomita grupo de ignorantoj rilate al poezio ekzistas almenaŭ du aliaj grupoj : Tiuj, kiuj tro pedante, racionalisme legas, kaj kiuj tro supraĵe legas.

Iu racionalisto iam multe laŭdis poemon mian pri frua mateno en Sarajevo, sed, kiel li diris : "Kial tiu henanta azeno, tiaj ne plu estas en Sarajevo !"

Aliflanke, poezion oni ne povas alproprigi al si kvazaŭ nur vidante la literojn. Necese ofte estas legi ripete vortojn, versojn, tutajn strofojn, plenan poemon, ĝis oni komprenas. Nature, se ĝi estas komprenbla !

Jam dum dua tralego oni trovas novajn valorojn, detalojn enhave kaj forme, kiujn oni eble preteriris unua-lege.

Efektive ekzistas en nia poezio kelkaj aferetoj, kiuj rekte ĝenas la legadon, sekve la komprenon. Mi pensas pri la majuskloj, la grandaj komenciliteroj ĉiulinie, metodo delonge eksmoda, sensenca en la moderna tipografio. Mi scias homojn, kiuj abomene forĵetas poemojn, kiuj portas tiun rokoko-ornamon.

Ankaŭ tro da elizio, apostrof-uzo, ĝenas la legadon. Efektive ĝi donas al nia poezio iun senhelpan, aŭ ĝuste helpingvan aspekton, kiun ni alie ĉiel klopodas eviti.

Eksperimentadon pri t.n. liberaj versoj oni devas aprobi, sed prefere ĝi kiel ĉia eksperimentado ankaŭ iam finiĝu. Manio tromodernisma sen formo kaj ofte sen enhavo ne povas allogadi legantojn. Multaj — ekzemple Johannes V. Jensen — komencis per liberaj versoj, sed poste trovis la avantaĝojn de la fiksaĵoj. La ritmo, la rimoj, la fiksaĵaj strofoj estas faktoroj, kiuj ne nur ebligas facile memori, sed kiuj kune kun la bildigo konsistigas firman bukedon, la faskon de poezio. Se tro dise, hazarde, ni vidas la florojn, rapide ni ilin forgesas.

Mi pledas por la antikva rimado, ĉiam nova. Rimo havas en si eksplodigan forton, ŝokan efikon en la fantazio de la poeto kaj, mirinde, same en la fidela leganto. Ĝi donas novan inspiron, surprizan direkton de la pensado. Se la poeto scias regi tiun sorĉan forton, kaj ne inverse, li sukcesas.

Guste poetoj flegu, flegadu la formon. Tro ofte ni spertas ke reagoj de publiko aŭ kritikistoj tute ne sin direktas al niaj ideoj, kiom ajn belaj ili estas, sed nur kontraŭ la formo sub kiu ili estas prezentataj — aŭ pli ĝuste kontraŭ la mankoj de tiu formo.

Poul Thorsen.

Lingva eksperimento en Arnhem (Nederlando)

Instruo de fremda lingvo al 8-jaraj infanoj

La 22-an de septembro 1958 komenciĝis interesa eksperimento en ok lernejoj en Arnhem. Al proks. 15 geknaboj de ĉiu el la ok lernejoj estas instruata fremda lingvo. En po du lernejoj oni instruas francan, germanan, anglan aŭ Esperantan lingvon.

La eksperimento estas organizita de la fondaĵo "Arnhem-Europa" kaj estas sekvo de la lingva konferenco organizita de tiu ĉi institucio en 1956.

La antaŭa ideo, fari Arnhem dulingva urbo, oni tiam ne povis realigi, ĉar restis ĉiam diversaj opinioj pri la lingvo kiun oni elektu kiel la duan lingvon: ĉu la anglan, ĉu la germanan, ĉu la francan, ĉu Esperanton.

Inter la lernejoj, kiuj partoprenas la eksperimenton, estas ĝeneralaj elementaj lernejoj, sed ankaŭ protestantaj kaj katolikaj. La provo kompreneble estas tute libera por la infanoj. La instruado okazas kvinfoje semajne, ĉiam dum kvarona horo tuj post la fino de matena aŭ posttagmeza instruoperiodo.

La ideo estas ke la infanoj — iomete kiel infanetoj lernas paroli kaj kompreni — nur ludante kaj aŭdante la fremdan lingvon ĝin lernos. La geinstruistoj, kiuj ĉiuj instruas en du lernejoj, do uzas la rektan metodon. La infanoj ne lernas gramatikajn malfacilaĵojn aŭ vicojn da vortoj. De tago al tago ili al kutimiĝas al la, antaŭe tute nekonata, lingvo per montrado de objektoj kaj iliaj nomoj, ripeto de tekstoj, kantado, ktp.

El la du lernejoj por ĉiu lingvo oni elektis unu en kvartalo kie la

gepatroj ĝenerale ne scias fremdajn lingvojn kaj unu tie kie ili grandparte jes scias aliajn lingvojn.

La kostoj de la eksperimento — kiu daŭros unu jaron — estas pagataj per subvencioj de la komunumo kaj de la "Prins-Bernhard"-fondaĵo. Post unu jaro oni decidus pri eventuala plilongigo de la provo.

Ni povas aldoni al la supra komunikado ke Esperanto ricevis en la eksperimento egalrajton kiel la tri en Nederlando ĉiam instruataj lingvoj, dank'al la bona impresio kiun ĝi faris en la lingva konferenco en 1956. Plie, ke nia lingvo estas instruata de s-ino E. Burgler—Ježsó, kiu pro tio transloĝiĝis de Spaubeek al Arnhem.

Vidu por raporto pri la lingva konferenco la julian-aŭgustan numeron de "Esperanto" de 1956.

W.

Kiun verboformon uzi?

En la januara numero de „*Esperanto*“, sur paĝo 11, meze de la unua kolumno, s-ro Gregor, en recenzo, tuŝas la problemon: ĉu ni diru: *estus devinta...i*, aŭ: *d:vus esti...inta?*

La respondo estu: jen tiel, jen tiel ĉi,

laŭ la kazo. Ambaŭ esprimoj estas diverssignifaj. Estis multaj verboj kiuj povas havi infinitivon kiel komplementon, ekz. *povi, devi, voli, lici, esti permesite, deziri, ŝati, plaĉi, kuraĝi, aŭdi, vidi, ordoni, rekomendi, rajti, esperi, kredi, opinii, deci, aserti, k.a.* Kun pluraj el ili "perfektaj infinitivoj" (*esti...inta* aŭ *esti...ita*) ŝajnas apenaŭ uzeblaj, ekz. kun *rekomendi, ordoni, esti permesite, kuraĝi*, sed eĉ kun tiuj oni povas konstrui frazojn kun perfektaj infinitivoj, ekz.: *mi rekomendas (resp. ordonas) al vi morgaŭ esti farinta tiun taskon; ne estas permesite peki, sed estas permesite esti pekinta; vi ja ne kuraĝus esti farinta ion tian pro la klaĉo de la deca oni!* El tio ĉi sekvas, ke ni devas nete distingi inter, ekzemple, *estus devinta...i* kaj *devus/esti...inta*, kaj krome, ke ankaŭ eblas eĉ: *estus devinta/esti...inta!* Tio validas en ordinaraj kondiĉaj frazoj kun subpropozicio kun *se*, kaj ankaŭ por la neprope kondiĉaj frazoj sen subpropozicio kun *se*. Mi konjektas, ke s-ro Gregor aludis speciale frazojn de ĉilasta speco. Ĝis nun mi opiniis, ke en ili nur formoj de la tipo *devus esti...inta* estas uzeblaj kaj korektaj. Tamen nun mi trovis ke tiel ne estas. Jen kelkaj ekzemploj de tiaj neprope kondiĉaj frazoj: *Ĉiuj infanoj ĉe la fino de sia elementlerneja instruigo devus esti lernintaj Esperanton. Mi tre volus esti vizitinta la Marsejlan kongreson. Mi estus devinta tiam demordi mian langon. Mi estus volinta tiam esti akceptinta ŝian proponon.*

Konkludo: ni elektu la formon laŭ la kazo. W. P. Roelofs

La novaj membroj de la Honora Patrona Komitato



S-ro Prof. Seiho Nishi, la famkonata japana anatomo.



S-ro Prof. Maurice Fréchet, mondkonata franca matematikisto.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:
Philippe Bonnard,
119 Avenue de Choisy, Paris 13, Francujo

LA 14-a INTERNACIA JUNULARA KUNVENO DE T.E.J.O.

La 26-an de julio malfermiĝis en Homburg-Saar, ĉarma urbo de orienta Sarlando, nia 14-a Internacia Junulara Kunveno, oficiala antaŭ-kongreso de la 43- U.K. kaj ĝenerala jarkunveno de nia asocio T.E.J.O.

Sub la honora protektado de D-ro Franz Jozef Röder, Sarlanda Ministro por Kulturo, Instruado kaj Publika Klerigado, tiu kunveno estis unu el la plej sukcesplenaj inter tiuj, kiuj okazis de pluraj jaroj, kaj pro la nombro de la partoprenintoj, kaj pro la riĉa enhavo de ties programo. El 15 landoj, el 4 kontinentoj (Aŭstrujo, Britujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Maroko, Nederlando, Svedujo, Svislando, Usono) estis 126 aliĝintoj, kaj alvenis ankoraŭ neanoncitaj kongresanoj el Maroko, Norvegujo kaj aliaj landoj.

Dum la Solena Inaŭguro, la kongresanoj estis bonvenigataj de S-ro Karl Bernhard Ziegenbein, urbestro de Homburg, kiu festis tiun ĉi jaron la 400-an datrevenon de sia urbiĝo. Saluti la kongresanojn la reprezentantoj de la landaj instancoj, kaj la reprezentantoj de la naciaj Esperantistaj Junularaj Asocioj. Post la akcepto de la kongresanoj, unue en la stacidomo per laŭparoliloj kaj tolafiŝoj, due en la pruntita oficejo de loka gazeto, la kongreso komenciĝis sabaton la 26-an de julio per komuna vespermanĝo. Ĝi okazis en la Junular-Gastejo de Homburg-Sanddorf kie la plimulto de la kongresanoj loĝis. Tiu vespermanĝo estis sekvata de la Interamikiĝa Vespero.

Dimanĉon la 27-an estis katolika kaj protestanta diservoj, poste je la 10-a horo kaj duono, la Solena Inaŭguro. Posttagmeze okazis la unua kunsido de la komitato de TEJO, (vidu raporton sube) kaj vespere la neforgesebla kongresa balo, kiu estis kiel eble plej ĝoja kaj agraba.

Lundon matene okazis la ĝenerala laborkunsido de nia organizo, kaj posttagmeze oni vizitis grupe la urbajn vidindaĵojn, kunportante flagojn kaj kantante tra la stratoj de la urbo flagornamita per germanaj, Homburgaj kaj Esperantaj flagoj, kaj per tolafiŝoj anoncantaj la kongreson. Vespere, Japana vespero, kun lum-bildoj kaj dancoj de japana samideana

ĵurnalistino; poste okazis diskutado kun reprezentantoj de la junularaj grupoj de Homburg.

Mardon: tuttaga ekskurso tra Sarlando, dum kiu oni multe kantis kaj amuziĝis en la aŭtobusoj, inter la vizithaltoj. La vespero estis libera, eĉ iome tro, ĉar kelkaj malseriozuloj estis preskaŭ devigitaj kuŝi sub la grandaj arboj de la romantika sarlanda arbaro!

Merkredon matene oni ĉeestis du prelegojn tre interesajn: la unua, de S-ro Jean Thierry, komitatano de U.E.A., el Parizo, temis pri "Kelkaj faktoroj de interpopola simpatio"; la dua, de S-ro Poul Thorsen, el Kopenhago, pri "Kelkaj problemoj de la Esperanta poezio". Posttagmeze oni ekskursis al Karlsberg-Kastelo, kaj vespere oni ludis kaj amuziĝis dum la "Gaja Vespero".

Ĵaŭdon la 31-an okazis sportaj konkursoj ĝis la 17-a horo, kaj poste Paul Ciliga raportis pri sia vojaĝo al la Junulara Mondfestivalo (Moskvo 1957), kie li oficiale reprezentis la estraron de T.E.J.O. (Vidu la artikolojn jam aperintajn en "la Juna Vivo"). Vespere okazis filmprezentado. Oni vidis tri belajn Esperantajn filmojn: la unua pri Oslo, la dua pri Nov-Zelando, kaj la tria estis la fama filmo de la internacia firmo Philips: Eŭropa Rapsodio.

Vendredon la 1-an de Aŭgusto okazis matene la oratora konkurso, kies temo estis: "Miaj hobiaĵoj", kaj poste la dua komitata laborkunsido. La posttagmezo estis libera, kaj ĉiuj bone sciis ĝin pleniĝi, ĉu per promenado, ĉu per vizitado de bierfabrikejo. Vespere estis la neevitebla Solena Fermo, feliĉe sekvata de biergustumado, kiu ebrietigis nin, kaj permesis fini la kongreson per ĝoja ridado.

Sabaton ĉiuj, kun kruela bedaŭro en la koro, forlasis la belan urbon Homburg, promesante al si reciproke baldaŭan revidon. Sed dum tiu Junulara Kunveno oni ne nur amuziĝis, sed ankaŭ laboris dum tri gravaj laborkunsidoj, kies protokolojn oni legu ĉi sube.

1-a Kunsido de la komitato de T.E.J.O.

(27 - 7 - 1958)

Ĉeestas: Heinrich Reiter por Aŭstrujo, Hans Frey por Danlando, Philippe Bonnard kaj Paul Ciliga por Francujo, Günther Becker kaj Richard Reuchlin por Germanujo, Carlo kaj Nicola Minnaja por Italujo, Lucien

Piétri por Maroko, Adriaan den Haan por Nederlando, Kjell Rehnström por Svedujo, Max Abegg por Svislando; entute 11 komitatanoj aŭ anstataŭantoj kaj 1 speciala komisiito el 9 landaj movadoj. Prezidas Becker; protokolas C. Minnaja.

Estas aprobita la tagordo:

- 1) Raporto pri la laboro de la provizora estraro;
 - 2) Elektro de prezidanto por la kunsido, malsarĝo kaj eksigo de la provizora estraro;
 - 3) Elektro de la estraro, de la revizoroj kaj de la arbitracia tribunalo;
 - 4) Propono de buĝeto kaj laborplano;
 - 5) Fikso de minimuma kotizo por subtenantoj;
 - 6) Nomado de honoraj membroj;
 - 7) Fikso de la loko por la 15-a internacia junulara kunveno;
 - 8) Proponoj de ĝenerala regularo kaj de kunvena regularo;
 - 9) Divido de la taskoj inter la estraranoj;
 - 10) Diversaĵoj.
- 1) La ĉeestantaj estraranoj Becker, Ciliga, N. Minnaja, Reiter kaj Reuchlin raportas pri la farita laboro; Becker legas la skriban raporton de Ben van Moorst; N. Minnaja raportas pri la laboro de Gian Carlo Figliera, kaj poste respondas al la demandoj de la komitatanoj pri la ĝenerala laboro de la organizo.

2) Abegg estas elektita prezidanto de la kunveno por direktado de la malsarĝo de la provizora estraro kaj elektro de la estraro. La provizora estraro estas unuanime malsarĝita kun varmaj dankoj pro la farita laboro.

3) Estas decidite, ke la estraro konsistu el 7 membroj, nome: prezidanto, 2 vicprezidantoj, ĝenerala sekretario, kasisto, redaktoro kaj unu plia membro. La elektro okazas laŭ sekreta voĉdono por kandidatoj proponitaj de la komitatanoj kaj akceptintaj la kandidatiĝon. Kontrolistoj estas Frey kaj C. Minnaja, kiuj ne akceptis kandidatiĝi.

Laŭ la rezulto de la elektro, la estraro de T.E.J.O. konsistas el:

Prezidanto: Günther Becker, Gasthaus Bürgerhof, Eisenbahnstr. 60, Homburg/Saar, Germanujo.

Vicprezidantoj: Lucien Piétri, 15 place Collet, Meknes, Maroko. Richard Reuchlin, T 6/18, Mannheim, Germanujo.

Ĝenerala sekretario: Nicola Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italujo.

Kasisto: Adriaan den Haan, Irene-straat 28a, Leiden, Nederlando.

Redaktoro: Philippe Bonnard, 119 avenue de Choisy, Paris 13, Francujo.

Estrarano pri kunveno: Paul Ciliga, 17 rue Duguay-Trouin, Paris 6, Fr.

Pro la malfrua horo Abegg fermas la kunsidon, kaj la restantaj punktoj de la tagordo estas prokrastitaj ĝis nova kunsido.

Generala Laborkunsido de la Internacia Junulara Kunveno (28/7/58.)

Ceestas 47 kongresanoj, reprezentantaj 12 landaj movadoj; krom la landoj reprezentitaj ĉe la komitato, troviĝas ankoraŭ Britujo, Germana Demokrata Respubliko kaj Hispanujo. Prezidas Becker, protokolas C. Minnaja. La tagordo estas:

- 1) Lego de salutedoj;
 - 2) Raporto pri la unua kunsido de la komitato;
 - 3) Raporto pri la agado de la organizo;
 - 4) 15-a Internacia Junulara Kunveno;
 - 5) Diversaĵoj.
- 1) Becker legas salutesprimojn de Teo Jung, Ben van Moorst, Michel Duc Goninaz, la T.E.J.O.-sekcioj en Bulgarujo kaj en Pollando.

2) Becker raportas pri la kunsido de la komitato kaj informas pri la nova konsisto de la estaro. N. Minnaja oficiale dankas la membrojn de la provizora estraro ne reelektitajn.

3) N. Minnaja raportas pri la agado de TEJO:

"La nova junulara sekcio de U.E.A. komencas marŝi; kvankam ne ĉiuj landaj asocioj konsciis pri la neceso energie apogi la junularan movadon per kreo de junularaj sekcioj, la sekcioj nun ekzistantaj vige laboras. Ekzistas landaj sekcioj de T.E.J.O. en Bulgarujo, Germanujo, Italujo, Svislando kaj Urugvajo. Fondiĝas sekcioj en Francujo, Nederlando kaj Svedujo. Estas kunlaborantaj sekcioj en Ĉeĥoslovakio, Hungarujo kaj Britujo.

La ĉefaj manifestacioj aranĝitaj aŭ helpitaj de T.E.J.O. dum la pasinta jaro estas: la 13-a I.J.K. en Ville-neuve-les-Avignon, proksimume 30 partoprenis, la renkontiĝo de la esperantistoj dum la 6-a Junulara Mondfestivalo en Moskvo, proksimume 250 partoprenis, la 3-aj TEJO-Skiferioj en Tauplitz, proksimume 10 partoprenis, la Skisemajno de Esperanto-Junularo de Svislando en Adelboden, proksimume 20 partoprenis kaj la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Majenco kun 50 partoprenintoj.

4) Willi Machleidt portas la rifuzan respondon de Esperanto-Junularo Berlino al la propono, ke ĝi organizu la 15-an I.J.K. Oni diskutas pri la oportuneco, ĉu ĝi okazu en okcidento aŭ en oriento. Estas esprimitaj la proponoj de okazigo en Pollando, en Ĉeĥoslovakio aŭ en Aŭstrujo. N. Minnaja promesas, ke la komitato memoros ĉi tiujn indikojn de la laborkunsido antaŭ ol preni decidon.

5) Ciliga prezentas rekomendon al la ĝenerala sekretario kaj proponon de rezolucio por la komitato. Den Haan prezentas proponon de malmultekostaj vojaĝoj por junaj esperantistoj, ankaŭ ekzamenotan de la komitato. Post mallonga pritrakto de la organizo de la sportaj konkursoj, Becker fermas la kunsidon.

2-a Kunsido de la komitato

Ceestas: Frey, Ciliga, Bonnard, Becker, C. kaj N. Minnaja, Piĉtri, Den Haan, Rehnström kaj Abegg. Prezidas Becker; protokolas C. Minnaja. Oni daŭrigas la laborojn laŭ la tagordo de la 1-a kunsido.

3) Kiel revizoroj estas elektitaj Ben Van Moorst kaj Helmi Veldhuyzen. Oni decidas prokrasti la elekton de la arbitracia tribunalo, ĝis la landaj sekcioj sendos taŭgajn kandidatojn tiucele.

4) Oni decidas uzi la monon senditan de S-ino Rees kaj apartenantan al la malnova T.E.J.O. por pagi kiel eble plej multe el la ŝuldo al Muusses, kaj samacele oni decidas vendi al la libroservo de U.E.A. la restantan stokon el la libroservo de T.E.J.O. Oni lasas tiujn taskojn al la personoj, kiuj ĝis nun okupiĝis pri tio, donante al Den Haan la komision, ekagi per la kontoj de 1959. Pli detala buĝeto kaj laborplano estas sendotaj al la komitatanoj por skriba aprobo.

5) Post vigla diskuto oni fiksas kiel minimuman kotizon por Amikoj de la Junularo la kotizon de MA de U.E.A.

6) Estas unuanime elektitaj kiel honoraj membroj prof. Ivo Lapenna kaj S-ino E. van Veendaal—Bouwes. Estas komisiita Becker, porti la sciigon al prof. Lapenna okaze de la festo je lia honoro dum la 43-a UK.

7) Laŭ propono de Rehnström estas per granda plimulto akceptita la decido, ke la 15-a I.J.K. okazu en Pollando; se tio ne eblas, oni turniĝu unue al Ĉeĥoslovakio, due al Aŭstrujo.

8) La propono de ĝenerala regularo kaj de kunvena regularo oni lasas al posta pristudo, efektivigota post la prezento de konkretaj projektoj.

9) Oni difinas la taskojn por la estraranoj, por kiuj ne estas antaŭvidita speciala tasko en la statuto. Tiel Piĉtri ricevas la taskon disvastigi T.E.J.O.-n ekster Eŭropo, Reuchlin devos prezenti proponojn de la cititaj regularoj kaj kunordigi la korespondajn servojn kaj la grupajn ĝemeliĝojn, Ciliga interŝiĝos pri la internaciaj junularaj kunvenoj.

10) Estas akceptita la rezolucio de Ciliga, jam prezentita al la ĝenerala laborkunsido, aperonta en "La Juna Vivo". Estas diskutita kaj akceptita la propono de Hans Bakker (Ni publikigos tiun proponon en "L.J.V.") kiu estas elektita speciala komisiito por la vojaĝaranĝoj antaŭviditaj en lia propono; li estos asistata de Den Haan flanke de la Estraro. N. Minnaja estas komisiita, fari en la 2-a ĝenerala kunsido de UEA dum la 43-a U.K. raporton pri la decidoj de la komitato de TEJO.

La kunsido estas fermita. La oficialan protokolon, surbaze de la protokoloj faritaj dum la kunsidoj, kompilis kaj subskribis

Nicola Minnaja,
ĝenerala sekretario de T.E.J.O.

Deklaracio de la komitato de T.E.J.O.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo estas neŭtrala asocio, sed ne neŭtralisma, ĉar ĝi agnoskas la homajn rajtojn; ĝi estas larĝe malfermita antaŭ ĉiuj esperantistaj gejunuloj, tial ke ĝi estas nek burĝa, nek proleta, sed kunigas membrojn el ĉiuj sociaj klasoj. Jen kial ĝi bedaŭras, ke la junulfako de Asocio, kiu uzas la Internacian Lingvon, estas tute apartigita de ĝi.

T.E.J.O. tre volonte akceptus la kreon en sia kadro de specialigitaj sekcioj, kaj tial plej varme alvokas ĉiujn esperantistojn, kiuj ĝis nun ignoris ĝin, alproksimiĝi al la ĝenerala esperantista junulara movado kaj pristudi la eblecon de komunaj aktivajoj kaj de kunlaborado sur pure Esperanta kampo, ĉar UNUECO estas FORTO.

Nur kunigite ĉiuj esperantistoj celkonseciaj sukcesos laŭŝtipe oficialigi la Internacian Lingvon kaj enkonduki ĝin en la lernejprogramojn. Nia movado ne devas aspekti kiel fermita rondo, sed nepre kontraŭstari la negativajn konsekvencojn de izoligemo aŭ sektemo.

N.d.l.R.: La supran tekston motivigis poŝtkarto de Sennacieca Asocio Tutmonda al Paul Ciliga, per kiu ĝi rifuzis aperigi informon pri antaŭa Internacia Junulara Kunveno, pretekstante ke SAT estas "per-esperanta" sed ne "por-esperanta" asocio. (!)



4-a Skiferio kaj 2-a Internacia Skikonkurso de T.E.J.O.

Filzmoos, apud Dachsteinmontaro,
Salzburg, Aŭstrujo.

La por ni rezervita pensio Ahoner loĝigos nur malmultajn geamikojn! Gejunuloj el pluraj landoj jam aliĝis. Prezo komplete: Aŭstr. ŝil. 380 por T.E.J.O.-anoj, kaj ŝil. 400 por neanoj. Antaŭpago de ŝil. 150. Al "Österreichisches Postsparkassenamt, konto Nr. 59.915 für "Heinrich Reiter, Salzburg" aŭ rekte al: Heinrich Reiter, Salzburg I, 557" al kiu vi ankaŭ direktu la aliĝojn kaj informpetojn (kontraŭ resp. kupono) Aliĝo sen antaŭpago ne validas. Por aliĝoj, kiujn ni ricevos post la 1-a de decembro, ni ne povos garantii lokon.

Nia situo: 1200 m super la maro. Skilifto, multege da variaj ekskurseblecoj, internacia skivilaĝo! Venu kun viaj geamikoj aŭ sola, sed aliĝu tuj. Ankaŭ komencantoj estas bonvenaj, ili ricevos kurson. (Pli longa resto eblos kontraŭ alpago de nur ŝil. 35 po kromtago).

(Represo petata)

FONDIĜO DE STUDENTA LIGO

Jam en Kopenhago, dum la studenta fakkunveno, oni vikle pridiskutis la problemon restarigi internacian organizon de esperantistaj studentoj. Per 17 voĉoj kontraŭ 3 oni decidis aliĝi al Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.). La statutproponon ellaboris elektita komisiono, kiu intertraktis kun I.S.A.E., por ke ĝi havigu al la nova Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (S.T.E.L.O.) rabaton je la kotizo kaj abono al "Scienca Revuo" Prof. Popoviĉ akceptis, ke S.T.E.L.O.-anoj havu 50% da rabato por individue aliĝi al I.S.A.E. (5 steloj anstataŭ 10) kaj pli favoran prezon (15 steloj anstataŭ 25) por aboni al la revuo.

La fondo de S.T.E.L.O. do povis okazi en Mainz, la 6-an de aŭgusto 1958.

En la nomo de la Estraro de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, mi varmege alvokas ĈIUJN gestudentojn kaj studentajn klubojn konigi sian adreson al la sekretario de S.T.E.L.O., J. Wells, Walten Rectory, Burton-on-Trent, Britujo, aŭ al la redakcio de "La Esperantista Studento", 34 rue de Chabrol Paris 10^a, Francujo (kiu transdonos). Necesas, ke ĉiuj studentaj fortoj kunlaboru por progresigi la Internacian Lingvon en la Universitatoj, nepre bazo por ĝia estonta enkonduko en la lernejojn kaj fina oficialigo!

UNUECO estas FORTO!

Paul Ciliga,
prezidanto de STELO

Kelkaj informoj post la Fondkunveno.

La nomo S.T.E.L.O. estis akceptita per 25 voĉoj kontraŭ 7 kaj 7 sindetenoj. Oni konsentis, ke la kriterio de "studenteco" estu matrikuligo kaj elmatrikuligo, kaj ne la aĝo. La teksto de la statuto estas detale pristudita kaj korektita.

Elektio de la Estraro:

Prezidanto: Paul Ciliga, el Francujo. Vicprezidanto: Sven Ziegler, el Danlando. Sekretario-Kasisto: John Wells, el Britujo. Ceteraj Estraranoj: Philippe Bonnard, el Francujo, Nicola Minnaja, el Italujo, Victor Sadler, el Britujo. Mirjana Simić, el Jugoslavio. Revizoro: Kerrin Masterman, el Britujo.

Oficiala Organo:

Bonnard (Francujo) proponis, ke "La Esperantista Studento" aperanta en Francujo, enhavu la oficialajn informojn de STELO. Dobčnik (Jugoslavio) proponis ke "La Progreso" aperanta en Jugoslavio enhavu tiujn informojn. 13 voĉdonoj por "La Esperantista Studento", 4 por "La progreso". La kunveno komisiis Bonnard redakti la oficialan informilon, sub la respondeco de la prezidanto de S.T.E.L.O.

Pri la organo, Bonnard kaj Dobčnik interkonsentis ke: la oficialaj infor-

moj aperos ankaŭ en la Progreso, kaj la abonantoj de "La progreso", povos aliĝi al S.T.E.L.O. pagante pli malgrandan kotizon, sed ne ricevante la devigan organon.

Kotizoj:

La individua membrototizo estas 13 steloj, kaj la membroj ricevas la oficialan organon de la ligo: "La Esperantista Studento" Tiuj, kiuj jam pagis abonkotizon al tiu gazeto, povos fariĝi membroj de S.T.E.L.O. je pago de 4 steloj. Estas same por tiuj, kiuj abonas al "La Progreso".

Pli detalaj informoj aperis en la Septembra numero de "La Esperantista Studento". Jen la listo de la perantoj de la organo:

Francujo: La Esperantista Studento, 34 rue de Chabrol, Paris 10. (Abonprezo 300 Fr. Postgirkonto 16 466 58 Paris).

Danlando: Sven Ziegler, Bjernedevvej 62, Brønshøj (Danaĵ kronoj 5).

Germanujo: Uwe J. Moritz (23) Oldenburg/Oldbg. Am Festungsgraben 53 (Germanaj markoj 3).

Svedujo: Kjell Rehnstrom, Skoldungagattan 28 A 11. Uppsala (Sved. kr. 3,5).

Britujo: John Wells, Walten Rectory, Burton-on-Trent (Brit. ŝil 5).

Italujo: Eduardo Zumbo, Casella postale 226 Torino. (Ital. lir 400).

Hispanujo: Juan Ortis Blasco, c/Francisco Eximinis 49. Valencia. (Hisp. pes 35).

Svislando: Max Abegg, Nordstr. 216-Zürich. (Svisaj frankoj 3).

Aŭstrujo: Heinrich Reiter, Salzburg I, 557. (Aŭstr. ŝil 20).

Al D-ro Kalocsay

Ekzistas jam kompleta Baudelaire, kvankam mi ne legis kaj eĉ ne vidis ĝin, kaj respondecas Kalocsay rilate al formo kaj Waringhien rilate al la senca fideleco. Ĝoja-trista iĝis mia koro, kiam mi legis tiun informon. Estas superflue diri al vi kial iĝis mia koro ĝoja. Pro kio la tristeco? Ĉar nek vi nek alia povus diri certe, ĉu estos baldaŭ kompleta Arany. Same ne ekzistas kompleta Aĉy, nek kompleta Vörösmarty.

Mi ĝojas pro Baudelaire, sed prezenti kompletan Arany-on en verda vazo povas unuavice nur vi. En ĉi laboro ne povas reheli vin Waringhien nek alia, nek forme nek sence. Vi restas sola, la sola antaŭ la giganta genio de Arany. La esperantistaro senpacience atendas pluan hungaran nektaron; la kruela tempo, kiun vi ignoris jam sur egipta tero ĉe faraono Ahn-aton, minacas vin. Venu pli frue hejmen ol Peer Gynt de Ibsen. Ni atendadas vin.

Bérci Darázs

Robert Browning:

Finvorto de virino

*Ne kverelu, kara,
Jam ne penu —
Viv' rehelu, kara.
— Dormo venu!*

*Vortoj plej sovaĝas!
— Vi kaj mi tre
Birdo disputaĉas,
Akcipitre!*

*Io nin vortantajn
Spuras strange —
Digu dirojn vantajn
Vang-al-vange!*

*Trompas verprezento,
Vin perfidas!
Arbon, pro l' serpento,
Ni evitas —*

*Kie pom' ruĝhelas,
For! — sciemo
Min kaj Evan pelas
El edeno!*

*Kie dio sorĉe
Min katenu —
Kiel vir' al kor' ĉe
Vi min prenu!*

*Gvidu min mentore!
Se necesos,
Pense kaj parole
Mi vin jesos —*

*Faros, se vi petos,
Laŭdezire,
Korpon, koron cedos
Jam al vi re!*

*Tiel estos morgaŭ,
Ne ĉi-nokte:
Devas mi la zorgon
Kaŝi ŝakte.*

*— Devas larmi, kara,
— Mi, malsprita!
Poste dormi, kara,
Amvolvita.*

El la angla trad. W. Auld

31- KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Dum la semajno 19.-25. julio la luma ĉefurbo de la norda finna lando gastigis la SAT-kongresanojn, 254 el 16 nacioj (aliĝis 327 el 17 nacioj). Inter tiuj 254 partoprenintoj venis 2 el Usono, 2 el Brazilo, 1 el Kanado, 1 el Pollando kaj 1 el Hispanujo.

La 31-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis en la moderna kaj space adekvata Laborista Domo en Helsinko, Finnlando. Multaj SAT-anoj faris grandajn oferojn por vojaĝi al tiu relative periferia sed ege vidinda ĉefurbo; vigla, amikatmosfera kaj kulture altnivela kongreso kompensis ilin.

La kongresaj kunvenoj inkluzivis tri laborkunsidojn, en kiuj multaj problemoj estis diskutitaj kaj progresa, pozitiva spirito konstante regis; du societajn vesperojn plus kultura vespero, en kiu finnaj popoldancoj kaj popolmuziko ludis tre gravan rolon; viziton en la Parla mento kun multaj interesaj klarigoj pri finna demokratio — en kiu virinoj ŝajne ludas tre gravan rolon kompare kun multaj landoj —; ekskursojn kiuj ŝajne ĉiuj tre bone sukcesis; frakciajn kunvenojn por instruistoj, fervojistoj, sennaciistoj, pacistoj, sindikatanoj, naturamikoj kaj socialistoj; kaj la Laboristan Universitaton. Ĉi-jare la prelegantoj en la Laborista Universitato estis Vilho Setälä, Mark Starr, Marjorie Boulton, Josip Vajdih kaj V. J. Kostiainen.

La Kongreso komenciĝis en tre prema atmosfero de internacia krizo, pri kiu bultenoj aperis ĉiutage sur la anoncablo, bultenoj kelkfoje spicitaj per la ironio de relative raciaj homoj alfrontate potenco manion. Tamen, la atmosfero en la Kongresejo restis tre amika, kamaradeca, kunlaborema kaj pozitiva. La speciala situacio de la francaj gekamaradoj kaŭzis kelkajn kortuŝajn sed ankaŭ inspirajn momentojn. Ĉijare kelkaj poloj sukcesis viziti la kongreson. Socialista kongresrezolucio akceptebla de ĉiuj estis finfine elaborita post la diskutoj en la laborkunsidoj.

Por la Esperanto-Movado ĝenerale, utilaj kaj interesaj aspektoj de la kultura laboro de SAT, laŭ la raportoj, inkluzivis daŭran kaj celkonscian laboron super la projektita Ilustrita Vortaro de SAT, kaj la eldonon de "Vojaĝo al Kazohinio" de la hungara esperantisto Sándor Szathmári, grava satira verko, kiu jam ĝuis grandan sukceson en la hungara lingvo. "Sennaciulo" aperis regule dum la jaro, kune kun nova kajero de "Sennacieca Revuo". Problemoj pri valutaj reguloj, kiuj en kelkaj landoj preskaŭ para-

lizas esperantistan komercon, estas konstanta malhelpo al S.A.T. same kiel al la neŭtrala movado; cenzurado kiu efikas kontraŭkulture estas alia

problemo. Sed S.A.T. konstante klopodas por solvi siajn problemojn.

M. Boulton

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	9.00-9.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3 ^o -Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 39.11 m, 30.93m, P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
Lundo	00 45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402m. (746 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. (D-ro Baur).
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m. (917 kcs), 221m. (1357 kcs). K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	16.40-16.50	Wien. 208m. (1440 kcs), 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Rádio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 32.30m., 26.20m., 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato). Radio I.B.R.A., Poŝfako 821, Stockholm I, Svedujo.
Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.50-23.00	Hilversum, 298 m. (1007 kcs), I, V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Rádio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Rádio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 402m. (746 kcs). P. K.R.O., Emmastraat 52, Nederlando.

Radio Roma. 3-X, Sankta Klara, patronino de la televido; 7-X, Tra la literaturo; 10-X, Leterkesto kaj bibliografio; 14-X, Novaĵoj el Italujo; 17-X, Itala sciencisto Torricelli; 21-X, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-X, Itala belarta urbo Mantova; 28-X, Itala poeto Petrarca; 31-X, Tra Romo: Siksta Kapelo. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj : D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

La Universala Ekspozicio

La Universala Ekspozicio de Esperanto fariĝis ekde sia brila unua prezento en Montevideo pli kaj pli firma elemento de la Esperanto-movado. Tio nun denove montriĝis en Mainz. Kaj krome evidentiĝis, ke la ekspozicio, lokita en inda ejo, estas impona kaj altgrade propagandefika al ĉiuj vizitantoj, precipe al neesperantistaj interesuloj. En Mainz la aranĝinto, s-ro Jolliet (Wiesbaden), pro komplezo de ĉefurbestro, s-ro Stein povis disponi pri kelkaj belaj salonoj de la famekonata Gutenberg-Muzeo, kiu per si mem konstante altiras multajn vizitantojn el ĉiuj partoj de la mondo. Ke la disponeblaj ejoj ne sufiĉis por ekspozicii la tutan, ampleksan materialon, ŝajnis unue bedaŭrinda, sed poste montriĝis, ke pro la necesa elekto inter la objektoj la aspekto de la ekspozicio kaj la impresoj, kiuj ĝi faris, entute estis profitintaj. La unuanimaj laŭdoj de la vizitantoj, kiuj nomis la ekspozicion unu el la plej belaj ĝisnunaj, pruvis tion ree kaj ree.

Estas malfacile elserĉi por mallonga raporto la plej belajn kaj menciindajn objektojn de tia ekspozicio. La interesoj de la rigardantoj ja estas tro diferencaj. Do, estu elprenataj nur kelkaj. Ĝojige kaj impone estis vidi la multnombrajn lernolibrojn kaj vortarojn. Tiuj — kune kun la ampleksa literaturo, kiu estis bele kaj sisteme aranĝita — pruvas, ke Esperanto vere estas vivanta kaj progresanta lingvo! La plej bonan impreson faris certe 20 grandaj kadroj, en kiuj troviĝis tabuloj kun eldiro

de eminentuloj pri Esperanto, artisme grafikitaj de la Landa Artlernejo. Ankaŭ la belaspektaj afiŝoj de UNESKO kun esperantlingvaj tekstoj estis multe atentataj. Specialan intereson trovis kaj kaŭzis miron kolekto de korespondataĵoj el 79 landoj, kiun s-ro Otto Böhm el Karlsruhe-Rüppurr estis afable disponiginta. Ĝi pruvis pli ol vortoj la disvastiĝon de Esperanto en la tuta mondo.


La ekspozicio, kiu troviĝis en la proksimeco de la Kongresejo, en bela aleo apud la Rejno, estis vizitata ne nur de granda nombro da kongresanoj, sed krome de ĉ. 800 neesperantistaj interesuloj, kiuj estis venintaj ne nur el Mainz kaj ties ĉirkaŭaĵo, sed pro la vojaĝtempo ankaŭ el ĉiuj partoj de Germanujo kaj el multaj aliaj landoj. Ke la vizitantoj grandparte konsistis el gejunuloj, inter ili multaj, kiuj la unuan fojon vidis ion konkretan pri Esperanto, estas plej ĝojige. La bona efiko videbliĝis antaŭ ĉio en la vigla disvendado de lernolibroj kaj varbmateriale.

La esperantistoj de la tuta mondo, kiuj per siaj donacoj kreis la Universalan Ekspozicion, povas fieri pri ĝi. Ili zorgu per konstanta pliampleksigo kaj plibeligo de la materialo, ke la ekspozicio fariĝu pli kaj pli ilia plej efika propagandilo.

Al la aranĝinto, s-ro Jolliet, U.E.A. estas treege dankŭluda pro la sindonemo, per kiu li dediĉis sin al la tasko. Multegan tempon kaj, nerekte, monon (lasinte por kelka tempo sian ordinaran salajratan laboron) li oferis por povi krei la ekspozicion.



La enirejo de la Universala Ekspozicio.



Parto de la ekspozicio.



Apud la haveno de Sankta Maria de l'Sonoriloj la Lordo Alva de Meroquinez konstruis la galionon *Rozo Hispana*. Li konstruis ĝin por iu el la belulinoj de la kortego, kiun li amis laŭ majesta maniero, ceremonia kvazaŭ la adorado de relikvoj.

Estante riĉulo, la Lordo konstruis ĝin el multkostaj materialoj — el cedroligno de l'Oriento, el hinda palisandro, tiel, ke ĉiu el ĝiaj tabuloj dolĉe odoris. Ĝiaj fiksiloj estis el forĝita argento, kurioze ellaboritaj. Per ties ama martelado la bazaroj de la argentistoj sonoriĝis dum plena jaro. Ĝiajn ferdekojn mozaikis la pargetistoj de Verono, desegnante ravajn figuraĵojn el koloritaj lignoj, pli brilaj ol maralgoj. La antaŭfiguro, skulptita el malmola ligno, estis la manfaraĵo de tiu artisto, kiu kreis la Madonon en la preĝejo de Sankta Jakobo de Seville. Ĝi prezentis la Rozon de Dio; ekkreis la oraj petaloj, tiamaniere ke aperis la Kruco — malofta kaj rava verkaĵo; por ĝin vidi, oni veturis de malproksime. La veloj de la ŝipo estis el delikata, blankigita kanvaso, borderitaj per ruĝa ledo de Kordoba. Ili portis envolvitan komplikajon de rozoj, broditan el flava aŭ karmezina silko de la sinjorinoj de Meroquinez. La ŝnuraro fariĝis el tiu karega kanabo, kiu kreskas nur sur la Sankta Monteto (apud Igorroti en Luzono); tiam, kiam ĝi alvenis en la manojn de la hispanaj rigistoj, unu ulno valoris je Florenca eskudo. Ĝian altan postajon, enhavantan tri nivelojn, ornamis

John Masefield:

El la Lando

Hispanujo

pentritaj remparoj; ĉiu el tiuj portis iun historian bildon pri la oceano, ĉiu verkita de iu Italo.

Tie oni vidis Ulison en lia ruĝbeka galero, remantan preter tiuj ŝalmantaj bubinoj, la Sirenoj. Jen la bargo de Antonio, tapetita de purpuro, veturiganta la belulinon de Egiptio laŭ Nilo. Jen ankaŭ la helhara Sankta Brandano, en sia koraklo el sankta ligno, ĉirkaŭita de kantantaj monaĥoj. Oni vidis la fiŝkaptadan boaton de Petro, kiun longtempe adoris la Galileanoj, tiam, kiam alproksimiĝis la printempa fiŝkaptado. Jen ankaŭ la Genovano en sia barko, la flava standardo belege flirtanta. Jen Ariono, ludanta liuton. Jen la strangaj maristoj de Atlantiso, la sep fratoj, kiuj amegis la marvirinojn, tiel, kiel priskribis la araba poeto. Jen bildo de la granda Diluvo, de la verdaj ondegoj feroce fluantaj, kaj ĵetantaj la Arkeon alĉiele. Kontraŭe troviĝis bildo de la Tago de Jugado; la oceano trankviliĝis, la dronintaj maristoj, tute glorigitaj, leviĝis triumfante dum la harpado de la ĉielaj aregoj.

Interne, la kajutoj estis ornamitaj per pluaj belajoj. Ĉar sur la plankoj de la kajutoj montriĝis rozoj, verkitaj el pargeto de skarлата kampeŝo, la verdaj folioj el tinkturita abiligno, ĉirkaŭ la pezaj floroj. La vandoj estis el karegaj lignaĵoj, skulptitaj en pilastroj, portantaj orumitajn rozojn supre. Sur ĉiu el la kajutaj muroj troviĝis pentraĵo, de Elizabeta kun siaj rozoj, de Maria en la florhava kampo, aŭ de aliaj Sanktuloj, kies simbolo estas rozo. La pordejoj estis beligitaj per blua tapeto el Persujo, aŭ de griza teksaĵo, hela je purpuraj pavoĵoj, de la teksmaŝinoj de la monaĥinoj de

Ilustraĵo de Jan Schaaap

Efrato. En ĉiu kajuto estis arĝenta lampo, kiu balanciĝis sur pivotoj antaŭ spegulo. En ĉiu kajuto troviĝis ankaŭ arĝenta krucifikso, super antikva incensilo el florita kupro, punktita de juveloj, el kiu supreniris, je ĉiu kanona horo, nubeto de dolĉodora fumo. Sur la kajutaj traboj estis pentritaj desegnaĵoj, ĉiam aŭ de ruĝaj aŭ de karmezinaj floroj, por simboligi samtempe la fortecon kaj la malfortecon de amo. Mozaikitaj sur iuj partoj de la muroj, ekzemple ĉe la skulptita kapo de la lito, troviĝis kuriozaj elĉerpaĵoj el la Sankta Skribo, laŭdantaj sanktan amon, aŭ strofoj de la amemaj poetoj, ekzemple Ovidio kaj Petrarĥo.

En ĉiu kajuto estis ŝranko, riĉa kiel relikvejo, enhavanta maloftajn librojn pri amo, skribitajn sur veleno per multkoloraj inkoj, de supraj kaligrafoj, por kiuj la arto estis la religio. Tie, oni vidis la Inferon de Danto, aŭ iun netakseblan rulon, sigelitan per ruĝa vakso, elmontrantan la greklingve verkitan fabelon de Psiko. Ĉi tiuj libroj estis binditaj per verda led, signo de senmorteco; sur ĉies kovrilo iu juvelisto estis forminta rozon el etegaj rubenoj, signanta la amon de la Sanktuloj.

Nu, ĉirkaŭ la ferdeko de ĉi tiu miriga galiono troviĝis kuriozaj kompletoj de kiraso, ĉiuj skrupule briligitaj. Apud la aperturoj, kiujn ĉirkaŭis po girlando de pentritaj rozoj, staris kanonoj el polurita latuno, brilantaj kvazaŭ oraj. Supre estis strioj el kanvaso, laŭlonge de la ferdeko, kiujn kurioze ornamis la blazono de la Lordo Alva, kaj desegnaĵoj sur koloritaj ŝildoj, montrante la kres-tojn de lia familo.

La maristoj estis ĉiuj Hispanoj de Boca Gara, la eta haveno de Meroquinez, kiu frontas kontraŭ la Atlantiko. La militistoj estis malmultaj, eble dudek glavistoj el Estramadura, kiuj estis servintaj en la Indioj sub Oviedo. Ili portis brilajn kirasojn, mozaikitajn per oro. Sur la kaskoj ili portis juvelojn, gantojn, aŭ plumojn, kiujn donacis la sinjorinoj, kiujn ili servis. Iliaj portepeoj estis el verda led, emblemo de espero. Ĉiu el iliaj epeoj estis ĉerpinta sangon, defendante iun belulinon. Se mi havus la plumojn de dudek poetoj, mi ne povus rakonti la gloron de tiu majesta vivo, kiun oni pasigis sur la *Rozo Hispana*, la ŝipo konstruita por la fianĉino de la Lordo Alva. Anstataŭ la ekzercadoj komunaj al militistoj aŭ ŝipanoj, oni kutimis kolektiĝi ĉirkaŭ la masto, por aŭdi iuspecan plaĉan kantadon laŭdantan amon, prezentatan de unu el la provencaj poetoj, da kiuj la ŝipanaro enhavis naŭ. Aŭ la liutistoj eble prenis siajn vjolojn, ludante ian dolĉan muzikon, kiu, per sia beleco, similis al la haroj de belulino. Je la krepusko, apud Boca Gara, dum la ŝipo pretiĝis por maro, la ŝipanoj kutimis ĉirkaŭstari la maston, portante siajn incensilojn, por kanti la vesperan Diservon je la unua vespera stellumo.

Nokte, sub la lunlumo, iuj el la ŝipanoj, venante el la mistera mallumo de la antaŭkastelo, kutimis

eklumigi la rozforman lanternon sur la poŭpo; ĝia vitro estis tinkturita karmezine, tiamaniere ke, kiam oni lumigis ĝin, ĝi montriĝis kiel rozo en la mallumo, vidaĵo eĉ supereganta veran rozon. Ĉiuj ĉi amemaj subtilecoj, ĉiu ĉi malŝparado de beleco, estis fabrikitaj por la Sinjorino Alathe de Aymonte, la virino amata de Lordo Alva. Li estis amindumanta ŝin dum la monatoj okupataj per la pretigado de la ŝipo por maro, ĉar li estis votinta, ke li alportu sian novedzinon hejmen al Meroquinez surmare, en ŝipo taŭga je ŝiaj naskrajtoj. Kiam estis preta la *Rozo Hispana*, la ŝipanoj surŝipe, la pruo benita de la pastraro, ŝi ekveturis el Boca Gara inter kantadoj, kiuj miksiĝis kun la sonorado de la preĝejo de Sankta Mario. Ŝi atingis Ayamonte post trisemajna veturo laŭ la marbordo, kaj ĵetis ankron je sunbrila posttagmezo malsupre de la florplenaj orangaj boskoj, kiuj parfumas ĝis hodiaŭ la domojn de la havenurbo. Morgaŭ li estis edzigit a ĉe la Katedralo, dum ĉiu sonorilo de la urbo ĝojege sonoris, kiel je Pasko. Post solena adiaŭo, li ekveturis kun la novedzino al sia hejmo ĉe Sankta Maria de l'Sonoriloj.

Troviĝas naŭ rokpintoj, altmare submergitaj, ĉirkaŭ tri mejloj for de la haveno de Ayamonte, je la sudoriento. Ili nomiĝas La Naŭ Dronintaj Knabinoj. Ili ja estas minaco al ŝiparo, sed lastatempe oni signis ilin per lumturo. Oni opinias, ke la piloto de Lordo Alva estis provizadita de Greka vino (iuj tamen deklaras, ke la fuŝdirektado estis la faraĵo de iu kavaliro el la sekvantaro de la novedzino, kiu tiom amis la belulinon, ke li ne povus toleri, ke ŝi apartenu al alia). Almenaŭ, la *Rozo Hispana* frapiĝis sur tiuj rokoj je tagmezo, dum la gaja ŝipanaro, brilkolora kiel bedo da tulipoj, toastis la belulinon. La ŝipo alfundiĝis post malpli ol unu minuto, en profunda, trankvila, blua akvo, kune kun la tuta ŝipanaro. La sola savaĵo estis itala liuto, ornamita per gajaj silkaj rubandoj, kiu morgaŭ flose alteriĝis.

Antaŭ malpli ol dek jaroj, kiam la Ayamonteanoj demetis la fundamenton de sia lumturo, skafandristo hazarde trovis la ruĭnon de la ŝipo, preskaŭ kompletan, sed kovritan per maralĝo, kaj mantelitan per iaspeca griza ŝlimo. La ulo obtenis iom da restaĵoj de la ŝipo, ekzemple pecetoj da ligno, najloj el arĝento, kaj rusta feraĵo, kiujn oni povas vidi ĝis hodiaŭ en la urba muzeo. La plano por relevigi la ŝipon fiaskis pro manko de monrimedoj, sed eblas, ke iu amerika milionulo, avida je dolaroj, formos kompanion por regajni la ŝipruĭnon.

Eblas, ke iu malriĉa hispana skafandristo, penetrinte en la grandan kajuton, trovos inter la pereinta pompo de la edziĝa festeno, la ostojn de tiuj grandiozaj geamantoj, kies skeletaj manoj ĝis nun tenegas la pokalojn, kaj kies blankigitajn fingrojn ĝis nun beligas la edziĝaj ringoj.

*El la angla tradukis A.J.L.H.,
kun permeso de la aŭtoro.*

Novaj Libro

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

LA VIVO DE LA PLANTOJ* de Paul Neergaard, pag. 127; multaj ilustraĵoj. Eldonis "STAFETO" (Serio Popularscienca, No. 1) 1957. Prezo 8 gld.; 32 steloj.

Jen vera plezuro. Tre malofte oni renkontas libron tute senmakulan kiel verkaĵo; jen unu el ili. Tipografaĵo, desegnaĵoj, stilo kaj zorgemeco de la enhavo de la teksto: ĉio estas siaspece perfekta; tiel elvenas ĝojo por la distingopovaj okuloj, ankaŭ pro la mento.

La aŭtoro estas plantsciencisto, efektive plantpatologo; tamen tiu ĉi artaĵo sin okupas neniel pri malsanoj aŭ aliaj malagrablaĵoj. Ĝi pritraktas plej agrable, kaj laŭ maniero tute simpla kaj preskaŭ poema, nur la vivon de la plantoj — el la movado de granda kampo de tritiko sub la vento ĝis la temo de elĉerpiĝo de la vivo, folifalo kaj morto. Ververe, la komencaj vortoj montras, kiel granda estas la majstrecio kun kiu D-ro Neergaard estras kunkune la vortojn kaj la faktojn sub kiuj kreskas la plantoj. Li skribas: "Facila vento sin movas tra granda kampo tritika". La kursivo estas mia; sed kiel genia la frazo! Tiu ĉi preciza, elpensita stilo plenumas sendefekte la tutan libron. Nenecese estas diri, ke la enhavo estas science fidinda; sed en tiu ĉi libro oni apenaŭ konscias pri la scienca bazo, nek la senfaka leganto bezonas sin okupi pri ĝi: li nur prenu la abundan plezuron kiu sin trovas sur ĉiu paĝo.

Nejuste estus atribui la tutan laŭdon al D-ro Neergaard; granda parto de la plezuro kiun donas tiu ĉi memorinda verko ŝuldiĝas al S-ro Mads Stage, kies perfektaj ilustraĵoj de multaj plantspecoj sin prezentas en maniero kiel eble plej harmonia kaj ĉarma. Mankas tute la kvadrataj fotoĵoj de ordinara libro; tiu-ĉi fakte ne estas ordinara verko; ĝi fluas sen unu sola ortangulo. La lertaj kaj artistaj desegnaĵoj de S-ro Stage, kiuj penetras la naturon, la fondon, ja la spiriton de la plantoj kaj iliajn plej intimajn partojn, sin disjetas tie-ĉie sur kaj en la paĝoj laŭ maniero kiu vere valorigas la belecon de la desegnaĵoj mem sed sumigas tekston kaj ilustraĵojn en unu ĝueblan kaj konstantan bildon. Oni dirus, ke la plantoj kreskas sentrudeme en la libro.

Tiu plej gratulinda verko de D-ro Neergaard kaj S-ro Stage estas la

debuta volumo de nova "Popularscienca Eldonserio". Ĝi estas originale verkita en Esperanto; ĝi enhavas liston de neologismoj kaj terminoj. La fakto ke ĝi estas esperantaĵo neniel influas mian laŭdodonon; ĝi estas vere unu el la plej ĉarmaj kaj laŭdindaj libroj, kiujn mi iam havis en la mano.

Gratulindaj estas ankaŭ la eldonisto (en Kanariaj Insuloj) kaj la danaj presistoj kaj aliaj fakistoj pri aranĝo kaj arta kaj senerara libro-konstruo. Aliaj libroj en tiu ĉi aŭ alia serio videble devos atenti altan normon laŭ intereso kaj enhavo. Al leganto mi konsilas varme la akiron de tiu ĉi libro, kaj pro la granda plezuro havebla legante ĝin, kaj ĉar ĝi estas senduba artaĵo, kies ebleco doni plezuron neniam malpliigos.

Hugh Nicol

QUO VADIS* de Henryk Sienkiewicz. El la pola tradukis Lidia Zamenhof. Eld. "Polonia", Warszawa, Polujo. 717 p. 14,5 × 20,5 cm. Prezo 10 gld., 40 steloj.

Novaj Esperantistoj ofte plendas, ke la klasikaĵoj de la Esperanta literaturo ne estas plu troveblaj. Ili pravas; sed pri tio ili devas kulpigi, ne la gvidantaron aŭ la eldonistaron de la Movado, sed kelkajn malsamideanojn, kiuj, disponante pri la kopirajto, eluzas sian leĝan pozicion, por rifuzi al la Esperantistaro la moralan testamentaĵon de la Majstro. La en la lasta tempo kuraĝe eldonita **Fundamenta Krestomatio** montris, kion eldonistoj riskas: la tuta en Francujon sendita stoko estas sekvestrita, kaj la eldona kompanio trovis sin antaŭ la minaco de leĝa proceso.

Feliĉe, niaj polaj samideanoj povis agi. Jam redoninte al ni la belan libron, **S-ro Tadeo**, en la traduko de Grabowski, ili nun regalas nin per ĉi tiu, kvankam ne bindita, tamen laŭ papero kaj preslitteroj luksa volumo. La dato de ĝia unua eldono, 1933, ne estas tiel malproksima; sed verko el la plumo de filino de Zamenhof, parolinta Esperanton ekde la aĝo de 9 jaroj, do preskaŭ denaska Esperantistino, plene rajtas titoliĝi klasikaĵo. Jen do ni havas 717 paĝojn de bonega Esperanto, vera minejo por ĉiuj, kiuj volas pliriĉigi sian esprimkapablon, samtempe kun la ĝuado de juste famekonata rakonto. Novaj Esperantistoj, jen por vi io por digesti dume!

Estas grave, ke taŭgaj vortoj aŭ frazeroj, unu fojon enkondukitaj en la lingvon, estu uzitaj de aliaj verkistoj, por esti plene absorbitaj en la vortaron kaj tiel fariĝi la tradicia, do deviga, formo. Se ili restas nekonataj, ekestas la danĝero, ke estontaj verkistoj perdos tempon kaj troŝargos la lingvon, elpensante aliajn, tute nenecesajn, sinonimojn. Unu ekzemplon por multaj: la frazero **laŭgrade kiel** (ĉu elpensita de Lidia aŭ ne) tre bone redonas tion, kion la Francoj esprimas per **au fur et à mesure que** kaj la Italoj per **man mano che**; sed Angloj, ne havante apartan vorton por tiu ideo, riskas pretervidi la neceson tiel distingi "kiel".

Iuj recenzistoj de ambaŭ eldonoj kritikis t.n. "strangaĵojn"; sed antaŭ ol rejeti ilin, oni devas konvinki sin, ĉu ties strangeco devenas nur de ilia nekonformiĝo al okcident-eŭropa kulturo, aŭ de ia eco iel kontraŭa al la spirito de Esperanto. Nur en la lasta okazo, miaopinie, ĝi estas rejtenda. Ekzemple, la frazo, **li ordonis ilin vipi** (124/18), redonas ekzakte la polan esprimon (ĝi retroviĝas ofte ĉe Kabe, ekz. **La Lanternisto** 62/6; kp. F.K. 73/-1); sed ĉi tie temas ne pri polismo, sed pri maniero esprimi sin, kiu estas tiel natura, ke ni trovas ĝin ankaŭ ĉe la antikvaj Grekoj kaj Romanoj. Kaj akceptante tiun, ni devas akcepti ankaŭ ĝian logikan etendiĝon, ili **ordonis porti sin** (44/-12). Ĉe tiaj demandoj decida faktoro estas la sinteno de la Azianoj: ĉu por ili la frazo estas komprenebla? Eble unu el ili bonvolos sciigi al ni.

Certe unu vorto estas stranga: **kontinui** anstataŭ **daŭrigi**. Sed la Esperantistaro jam verdiktis pri tio, kaj la vorto juste mortis pro neuzo.

Traduko tamen estas pli ol la sumo de siaj unuopaj vortoj; kaj rilate la impreson, kiun la tuta verko faras sur la leganton, ni tute konsente povas ripeti la opinion de recenzisto de la la eldono: "la traduko estas glata, facilflua, bonege ekvilibrata, kristale klara". Plue, laŭ T. J. Guérinite en **B.E.** de Aprilo 1934, la "traduko estas multe pli kompleta ol la franca kaj angla tradukoj". Tion mi ne kontrolis. Kion mi ja konstatis, tio estas la tre granda ekzakteco de la Esperanta. Jen tri ekzemploj: ĉap. 3 (689/-8) angla "wool"; pola kaj Esp. "ruĝan lanon"; ĉap. 31 (337/7) angla "mummies" (mumioj!), pola kaj Esp. "homoj"; ĉap. 11 (129/-2) angla "Did he not know that the gods she worshipped were better and purer..." (t.e. Ĉu li ne scias, ke la Dioj, kiujn ŝi adoris, estas pli bonaj kaj pli puraj...), Esp. "De kie li scias, kiajn diojn ŝi konfesas, kaj ĉu ne pli purajn, ne pli bonajn...", kio ekzakte redonas la polan "Skądże wie, jakich ona bogów wyznaje i czy nie czystszych, nie lepszych..."

Efektive, oni povas demandi sin, ĉu la ekzakteco ne estas troa. Ekzemple, kial la stranga vorto "dronejo" sur

p. 445/7, kiam la angla (kiel ankaŭ mia vortaro) tradukas la polan **toni** per "abyss" (abismo)? Nur pro tio, ke la pola radiko signifas "droni". Aŭ pli grave, en la 3-a frazo de la sama paragrafo, al la 5 participoj de la pola respondas 5 Esperantaj kaj nur 2 anglaj. Demando: ĉu tia uzo de participoj estas slavismo aŭ io esence Esperanta? Niaj stilistoj devas decidi.

La korektado de la Ia eldono estas tre zorge farita. El la 37 preseraroj kiujn mi tie rimarkis nur 3 bagatelaj restas (177-1, 217-7, 581-5). Eble posedantoj de tiu eldono volus korekti la sep pli gravajn, anstataŭigante en Vol. 1, 110/11 konsiderinde, 110/17 rekompenco, 212/10 konsolojn; en Vol. 2 39/-13 promesas, 174/-11 sed, 174/-6 al, kaj enmetante en 2,10/-10 inter "iri" kaj "Aŭgusto" la vortojn: "kun nia graso, maldikkrura, nekomperebla dia Cezaro,"). La piednotoj estas translokigitaj al la fino de la verko.

Ĉi tiu libro eniras do kun aliaj la klason de la duoble klasikaj. Ĝi meritas rapidan disvendigon inter la nova generacio de Esperantistoj; kaj ĉiuj aliaj, kiuj ne aĉetis la unuan eldonon, havas nun la okazon, rebonigi sian eraron.

D. B. Gregor

GRAND DICTIONNAIRE ESPERANTO-FRANÇAIS*, de G. Waringhien, eld. librairie Centrale Espérantiste, 41, rue Descartes, Paris, 368 p 19 × 13. Prezo 22.- gld.; 88 steloj.

Ĉiuj iom konsciaj Esperantistoj scias, kian rangon inter iliaj vicoj havas la aŭtoro de ĉi tiu vortaro: jam de jardekoj li estas la Direktoro de la Sekcio "Generala Vortaro" de la Esperanta Akademio.

Mi pensas, ke ne estas nenecese aldoni, ke al tiuj titoloj Profesoro Waringhien rajtas alkalkuli, ke li kunlaboris en la komunlingva parto de la reeldono de la fama "Larousse du XX^e siècle" kaj ke, krome, kaj i.a. li estas membro de la Lingva Konsilantaro de "Office du Vocabulaire français", en kies Honora Komitato sidas kun li 13 membroj de la Franca Akademio, 2 de la Goncourt-a kaj dekoj da anoj de la Franca Instituto, eminentaj beletristoj, universitatuloj kaj profesoroj.

Ĉi tion mi substrekis por montri, ke ne nur en la leksilogion de Esperanto Prof. Waringhien rajtas enmeti la nazon kaj ke, laŭ la franca proverbo: "kiu plej multe kapablas, tiu ankaŭ ĉe la malpli grava kapablas".

Cu tiuj linioj sufiĉos por anticipe respondi al la kritikoj de tiuj, kiuj riproĉos al la aŭtoro de la supre citita vortaro, ke li allasis en ĝi multajn vortojn, kiuj al ili ne plaĉos — tiuj famaj neologismoj? Verdire Prof. Waringhien jam en la antaŭparolo admonis, ke tiujn vortojn li registras por ebligi al la francaj uzantoj de la vortaro la komprenon de ĉiuj utiligataj

vortoj de Esperanto, ĉu tiuj estas tute bonvenaj, aŭ ne tute, aŭ tute ne — kio estas sufiĉa pravigo.

Cetere — kaj tio estas plia provo kontentigi la skrupulemulojn — li zorge signis, ĉu la radikoj estas oficialaj aŭ ne. Sed, krome, li skrupule devigis sin referenci al pli ortodoksaj aŭ pli proze kutimaj formoj ĉe la dubindaj novaĵoj, kaj eĉ ĉe formoj ofte jam preskaŭ ĉie agnoskitaj.

Krom tiuj ĝeneralaj konsideroj, oni povas noti ankaŭ la jenajn pli specialajn punktojn.

1-e, la vortaro de Prof. Waringhien estas la plej kompleta el ĉiuj, kiuj ĝis nun aperis. Ĝi entenas ne nur ĉiujn radikojn de la komunlingva vortrezoro, sed ankaŭ ĉiujn teknikajn terminojn uzeblajn en la ordinara vivo kaj ankaŭ ĉiujn poeziajn fakvortojn: la aŭtoro deziris, ke franco, kiel jam dirite, povu, dank'al tiu verko, legi kion ajn (krom la tute sciencajn traktatojn) en la esperanta literaturo. Kompreneble, oni povus bedaŭri, ke mankas kelkaj radikoj, kiel: bavi, diskriminacio, dista, fola, giri (rondiri), kaskedo, koalo (mam.) limeriko, mareneno (fiŝo), okcitana (lingvo), opresi (pol.), viktualio — sed neniu vortaro povas flati sin esti absolute kompleta.

2-e, ĝi entenas tre grandan nombron da kunmetitaj vortoj, senkompare pli grandan ol en la plej riĉa tiurilate, tiu de MILLIDGE; multaj el tiuj kunmetaĵoj estas uzataj aŭ uzindaj en la ĉiutaga vivo, kaj estis ne senutile fiksilian formon kaj ĝustan signifon: plejofte la Esperanto-naciaj vortaroj kontentigis sin per indiko de la radikoj, lasante al la trovemo de la leganto la tradukon de la kunmetoj. Vere tre riĉa rikolto, farita el evidente ĉiaspecaj legaĵoj. Nur malmultaj mankoj, laŭ mia gusto, i.a. "ladurbo" (france: bidon-ville).

3-e, ĝi kuraĝe entenas tre multajn proprajn nomojn, ne nur Bibliajn (ja la unuan fojon, kiam vortaro enmetas ĉiujn formojn uzatajn de Zamenhof, kaj ofte tre malsimilajn al tiuj uzataj en la naciaj lingvoj heredintaj el la latina formo), sed ankaŭ geografiajn, kaj ĉi tio estas vera progreso, ĉar tio almenaŭ prezentas koheran proponaron, en kiu ĉiu el ni povos elekti, kaj kiu espereble servos al unueco de la uzado; ankaŭ la antikvaj nomojn la aŭtoro zorge fiksis, laŭ la principoj difinitaj de Wüster, sed iom modifinte ilin en kelkaj punktoj. El la geografiaj, estas konstateblaj nur kelkaj mankoj: Azerbajĝano, Ganao (kiu vortaro en la mondo kapablas esti absolute lastdata en tempo de senĉese ŝanĝiganta geografio?), Jemeno, Kidron (Biblia), Osso (monto), Parsio (popolo), Slesvigo; pri "Senegalo", oni povas demandi sin, kial la aŭtoro ne konformigis tiun nomon al sia konstanta metodo, t.e. difini per ĝi la riveron, kaj nomi la landon "Senegalia"?

Kompreneble, restas en kelkaj artikoloj iaj duboj aŭ eĉ eraroj: Prof.

Waringhien montris al mi, ekzemple, ke, laŭ afablaj avertoj de kompetentaj homoj, "marhirundo" egalas ne al "procelario", sed "glareolo", kaj "petrelo" devus simple montri homonimion al "procelario"; "miogalo" estas "desman musqué" kaj ne "rat", "pastoro" estas la birdo "roselin" kaj ne "martin". Mi devas konfesi, ke en tiuj punktoj mi volas blinde fidi al la tre sciaj specialistoj! Temas do pri kelkaj bagatelaj, kiujn la aŭtoro havas la okazon reĝustigi en ia eventuala aldono.

Fine, oni rajtas diri, ke, dank'al la verŝajna, se ne diri: necesa, laboro de la kunhepontoj de la Plena Vortaro, tiu ĉi vortaro prezentas jam la ĉefajn trajtojn de la estonta (?) Plena Ilustrita Vortaro. Ĝi estas jam la komplemento de la Plena Vortaro, kiu liveras la ekzemplojn, dum ĉi tiu donas la tradukojn en franca lingvo.

Per tiuj kelkaj rimarkoj estas kredeble montrita la seriozeco de la prilaboro de ĉi tiu vortaro, kiu estas por francparolantoj vera monumento de la nuna Esperanto.

La aspekto kaj arango: modelaj. Bedaŭrinde, malgraŭ zorga kribrado enrestis ne malmultaj preserajj boldetoj: mi devas ĉi tie pentofari plej humile, ĉar en la korektado de la presprovaĵoj mi partoprenis! Al la "erratum" trovebla ĉe la unua paĝo de la vortaro, necesus almeti plilongigon minimume dufoje pli ampleksan!

Fine, oni ne tro multe laŭdos al la Esperantista Centra Librejo, kiu kun sia kutima entreprenemo plej kuraĝe impetis por la eldono de tiu gravega, nemalhavebla, verko!

Roger Bernard

LEXIQUE FONDAMENTAL ESPERANTO-FRANÇAIS* (fundamenta leksikono Esperanto-franca), de Roger Léger, eldonis "Editions Nova", Mulhouse, 112 p. 17 × 11, prezo 4,50 gld.; 18 steloj.

Kiel tion substrekas la aŭtoro, la jena verko estas ne vortaro en la kutima senco de la vorto, kun difinoj por ĉiu radiko aŭ termino. Ĝi estas pli ĝuste vortolisto — sed kompleta, t.e. entenanta ĉiujn vortojn de la Plena Vortaro, 4-a eldono kun Suplemento — destinita al francoj kaj dividita en du partoj. La unua entenas ĉiujn radikojn ne tuj kompreneblajn al franco aŭ kies senco malsimilas pli-malpli al tiu de la respondaj francaj vortoj, kun difinoj mallongaj, sed ĝustaj kaj precizaj; la dua, ĉiujn aliajn radikojn pri kies senco ne povas dubi franclingvano, ankaŭ la sciencajn terminojn tute similajn al la respondaj francaj.

Malgraŭ la ŝajna simpleco de ĝia koncepto, la aŭtoro de la leksikono montras klare la oficialecon aŭ neoficialecon kaj eventuale la zamenhofecon de la radikoj; li ankaŭ precize signas la transitivecon aŭ ne-transi-

tivecon de la verboj, same la duoblajn formojn esperantajn de unu sola nocio.

Ne pretendante anstataŭi la aliajn vortarojn, tiu tre scienca verko, pli ol simpla helpmemorilo, vere taŭgas kiel laborilo en multaj okazoj. En tio helpas ankaŭ ĝia praktika formato.

Gratulojn al Sinjoro Léger kaj al la eldonfirmo NOVA.

Roger Bernard

RETORIKO, KUN APARTA KONSIDERO AL ESPERANTLINGVA PAROLARTO*.

Verkita originale en la Internacia Lingvo de d-ro Ivo Lapenna, dua eldono, reverkita kaj kompletigita. 294 paĝoj, 19^{1/2} × 14 cm, eldono de la aŭtoro, Rotterdam 1958. Prezo de tole bindita ekzemplero 22 anglaj ŝilingoj, 11 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro; broŝurita, 18 anglaj ŝilingoj, 9 ned. guldenoj aŭ egalvaloro.

Kun bela kovrildesegno de Reto Rosetti laŭ bronza Apolono antikva, kaj trafa fotoportreto de nia tre ŝatata oratoro, la fama *Retoriko* digne reaperas en dua zorge tralaborita eldono. Jam per si, reeldono de originala verko post nur ok jaroj estas grava evento en la historio de la Esperanta literaturo.

Kiel oni rajtas atendi de tiel lerta retoro, profesoro Lapenna sekvas klare konceptitan planon: li dividas la verkon en du partojn. En la unua, titolita *Lingvo*, li demetas la fundamentojn kaj donas la kadron. En la dua, la kernparto titolita *Retoriko*, li ĝisfunde pritraktas la ecojn postulitan por calkonscia oratoro kaj lia publiko, la tre diversajn specojn de paroladoj profesiaj kaj neprofesiaj kaj la partojn aŭ sekciojn de taŭge organizita parolado. Por ilustri siajn multnombrajn saĝajn komentojn pri detalaj punktoj la aŭtoro provizas specimenojn de paroladoj: du el Julio Cezaro de Shakespeare, unu de d-ro Zamenhof (St. Petersburg, 1910), unu de d-ro Privat (Haarlem, 1954), kaj unu de si mem (Sorbonne, 1950). Menciindaj estas krome la du antaŭparoladoj, unu de Reto Rossetti, (1950), kaj unu de G. Waringhien (1958). La uzeblecon de la verko pligrandigas la enhavoriĉa indekso, kiu ampleksas deksep paĝojn.

Por praktike montri mian dankemon al Lapenna pro la plezuro, kiun mi spertis legante lian verkon, mi faros kelkajn rimarkigojn — el lingvofakula vidpunkto — pri la unua parto. Unue kaj ĉefe mi ŝatus diri, ke mi admiras la diligentecon, kun kiu li trastudis la fontverkojn rilatajn al la historio de la lingvoscienco kaj la klarecon, kun kiu li formulas siajn konkludojn. Komprenible troviĝas polemikaj demandoj, pri kiuj oni havas diversajn opiniojn, kaj mi mem estus estinta iom pli skeptika pri la teorioj de Marr kaj de Max Müller — kiu tamen siatempe estis granda erudiciulo.

Lapenna estas ĉie objektiva kaj senpartia. Neniel ajn li meritas la kruelan riproĉon de ĉarlataneco... Li donas interesan skizon de la teorioj pri la origino de lingvo, pri la faktoroj influantaj ĝian evoluadon kaj pri la lingvo kiel socia fenomeno. Utilaj por Esperantistoj estas la ĉapitroj pri la formiĝo de komunlingvoj — al kiuj oni povus aldoni la Inkan aŭ Keĉuan kaj Tupi-Guaranian en Suda Ameriko — kaj precipe pri la Internacia lingvo. Jen kelkaj sugestoj por eventualaj novaj aldonoj; — (a) p. 25. Preskaŭ ĉiuj historioj de lingvistiko silentas pri du pioniroj de kompara filologio, kiuj antaŭis eĉ Grimm, Rask kaj Bopp, tamen ne nur sur la kampo de hindeŭropaj lingvoj. Temas pri du madjaroj, nome la jezuito J. Sajnovics kiu jam en 1772 publikigis siajn ideojn pri la komuna origino de la ungara kaj lapona lingvoj kaj Samuel Gyarmathi, kiu montris per komparo de gramatikaj strukturoj (kp. Bopp) la preparecon de la ungara kaj la finna lingvoj (Göttingen 1799), tiel fondante la ugro-finnistikon; (b) p. 27. Priparolindaj estas pluraj novaj tendencoj en la lingvoscienco de la pasintaj tridek jaroj, ekz. la evoluado de la "fonologio" (la Praha skolo) kaj la "fonemiko" (precipe en Usono) kaj la intensiva studo de semantiko.

La parto *Retoriko* estas vera majstroverko. Ĝi estas antaŭ ĉio altgrade praktika kaj plena de prudento kaj bonsenco. Ĉie oni trasentas la multjarajn spertojn de oratoro dotita per naturo, kaj perfektigita per ekzerco. Lapenna staras firme en la tradicio de la romaj retoroj, kiel ĝi troviĝas hodiaŭ precipe en la mediteraneaj landoj. Male de tio, ke la nordanoj — inkl. de la Angloj! — emas uzi la vorton "retorika" iom malestime, la Francoj nomis unu el la plej supraj klasoj de la klasika gimnazio "classe de rhétorique", kaj mi ofte miris pro la facileco, kun kiu eĉ simplaj burĝoj francaj povis fari paroladeton, ekz. okaze de edziĝa festo, senhezite kaj sufiĉe elegante. En Britujo ni certe povas dediĉi pli da atento al la arto paroladi. Mia unua renkontiĝo kun Lapenna estis en la jaro 1949 en la kongreso de Bournemouth, kie li prezidis la juĝantaron de deklama konkurso. Juna brito eble estus gajninta la premion, se li ne estus starinta — dum la deklamado — tenante la manojn en la poŝo! Estis tiam, ke mi unue komprenis la gravecon de ŝajne bagatelaj detaloj kaj efektive neniu el la reguloj, kiujn Lapenna starigas kaj pridiskutas, estas superflua. Ne nur la ekzempligo de retorikaj "figuroj", sed ankaŭ la rekomendoj pri la uzado de la voĉo (alteco, rapideco, intenseco ktp.) kaj pri la gestoj kaj la vestoj estas salutindaj. Kion li diras pri la moralaj ecoj de la oratoro, precipe honesteco kaj kuraĝo estas korvarmiga, ĉar ili estas ecoj kiujn Lapenna mem pose-

das. Plene utiligebla estas la ĉapitro XIII, kiu trafe pritraktas ekz. la diversajn specojn de profesia parolado (sciencia, eklezia, politika, ĵuĝeja kaj soldata) kaj la aranĝon de parolado kun enkonduko, ĉefparto kaj fino.

Flue kaj plaĉe verkita *Retoriko* estas vere elstara kontribuo al nia originala literaturo; ĝi meritas ke ĉiu Esperantisto legu kaj pripensu ĝin. Certe oni ne povus imagi al si pli valoran donacon.

W. E. Collinson

CENT ĜOJKANTOJ de Marjorie Boulton. Eldonita de la aŭtorino ĉe 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo. 1957. 48 paĝoj kun antaŭbildo de Reto Rossetti.*

Tiu ĉi nova libro de Marjorie Boulton estas laŭ temaro unika verko en la Esperanto-literaturo. La polurita artismo de kelkaj ties unuopajoj levas la unuavide banalajn temojn pri bestoj, plantoj, manĝaĵoj ĝis pli alta potenco. La poetino emfaze pravas per la ĝenerale alta nivelo de tiuj ĉi koncizajoj faktoj jam rivelitan en ŝia unua poemaro *Kontralte*, ke ŝi majstras la teĥnikon de mallongaj poemoj: "Eksidu..." flustras la filikoj, proponas belajn verdajn plantomanojn, kvazaŭ amikoj....

Ĝenerale la humoro de la libro estas gaja, facileca, kaj ĝi proponas al ĉiuj enmemorigindajn versojn, kiuj ĉiam sukcesos doni plezuron en eĉ morozaj momentoj. La ligiteco de la versoj kun ĉiutagecaj aferoj, spertataj de ĉiuj, konkretigas kaj aktualigas ilin ĝis nivelo de komuna partopreno. Jen, fine, poemaro, kiu kontentigas ĉiun!

B. R.

AL DIO SONU NOVA KANT. Kantikaro katolika en lingvo internacia, tradukita de Felix Ney. Munkeno 1958. 40 paĝoj.*

La jena malgrand-formata libro liveras al la katolikaj Esperantistoj ne malindajn tradukojn de 27 germanaj himnoj kun akompanaj muziknotoj. Iom strange impresas "konfidegu" (pro rimo), — "kripo" ne troviĝas en Plena Vortaro, sed devas evidente signifi "staltrogo, furaĝujo" (germane Krippe). La formo *Jesuo* estas preferinda al la formo *Jeŝuo*, uzata en la libro.

B. R.

VERSAJOJ PROPRAJ KAJ TRADUKITAJ de Julian Tuwim. 130 paĝoj, 15 × 21 cm, kun tutpaĝa fotoportreto de la aŭtoro. Kartonita, kun bilda ŝirmkovrilo. Eldonejo "Polonia", Varsovio. Prezo 6.- gld.; 24 steloj.*

Oni diras, ke traduki poemon signifas "danci en katenoj". Bona tradukanto la katenojn transformas al braceletoj, kiuj donas formalan belon

al la danco; malbona tradukanto faras ilin trudaj pezajoj, kiuj stumbligas la dancanton. Ni estas feliĉaj, havante en Esperanto lingvon eksterordinare elastan kaj sonoratan: dank' al tio ni havas tre multajn tradukitajn poemojn, kiuj efikas senpere, kvazaŭ originaloj (kelkaj eĉ superas la originalojn). Nia poezia kulturo ampleksas do poemojn originalajn kaj tradukitajn en komuna trezoro.

Se mi pensas pri amataj Esperantaj poemoj, mi zigzagas preskaŭ senkonscie inter originaloj kaj tradukoj. Sur miaj bretoj, sama mikso: mia rigardo migras tra verkoj rektaj kaj peritaj, konataj klasikoj kaj hazardaj personaj trovoj. Kaj al tiu vico de spirita travivaĵoj nun aliĝas la poemoj de Julian Tuwim.

Tre inde. Mi trovas poeton varihumoran kaj multetonan, interpretitan de virtuoza tradukanto, kiuj ofte donas al la refandoj plenan valoron de originaloj. La poemo *Kristo* per sia milda, konsterna potenco min batis kiel fulmo. Kaj *Muŝo*... Ĉu paroli pri la majstre simpla arkitekturo de tiu obseda poemeto, aŭ ĝin citi? Mi iom pridubas la efikon de poemoj cititaj en recenzoj, sed mi riskos:

*Stumpo kandela
Fande finbrulas,
Muf' en anguloj
Grumble ululas.
Buŝo sur mano,
Fruŝ' sur la dua,
Mi nun ĉetablas:
Bildo enua.*

*Haltis horloĝo,
Ne ĉirpas grilo,
Muŝ' nur baraktas
Sur la ĝluilo:
Morten vadanta
Vibras kaj bruas,
Vee zum-zumas,
Mondojn ĝi skuas.*

La poemoj en ĉi tiu libro havas kalejdoskopon varion de temoj el la vivo urba kaj kampara, kun humoroj plensanga, tenera, melankolia, gaja. Komune ili havas modernecon de spirito, kaj ĉion regas intelekto, trasantoj kaj artisma seriozo. Eĉ la ĉarmaj Infanversajoj (tiu pri *Elefanto sen memoro* sonas tute spontane, kvazaŭ mem Schwartz estus ĝin verkinta!) estas neniel diletantaj, sed ame verkitaj de poeto, por kiu (kiel diras la Antaŭparolo) "ne ekzistas aferoj grandaj kaj malgrandaj". Mi havas impreson, ke Julian Tuwim verkis same pure kaj koncentre, kiel Rainer Maria Rilke, kies devizo estis: "Verku nur se vi nepre devas verki, kaj tiam ne demandu al iu alia, ĉu viaj versoj estas bonaj aŭ malbonaj".

Mi sentas ke, ĉe poeto tiel multkorda, ĉiu ion rikoltos por sia spirita bukedo. Inter miaj akiroj estas la *Kanto de sabata vespero*, kie ribele laŭtas diboĉema ebrulo. Neniam mi trovis la elizon pli triumfe, voĉkandence uzitan ol en la lasta strofo de ĉi tiu poemo.

Tuwim scipovis Esperanton, kaj aldonitaj estas 11 poemtradukoj liaj. La libro estas bele presita kaj ekipita. La ekspresionisma bildo sur la kovrilo faras dekoracion verve delikatan.

R. Rossetti

KENNSLUBÓK I ESPERANTO de Magnús Jónsson frá Skógi. Eldonis Prentsmidjan Leiftur, Reykjavík, Islando. 1957. 115 paĝoj.

Jam de longe mankis taŭga lernolibro de Esperanto en la islanda lingvo. La unua, tiu de Thorsteinn Thorsteinsson, eld. en 1906, antaŭ longe elĉerpigis; ĝi taŭgis unuavide por inteligentaj memlernantoj per sia troa koncizo. La trivolumenta lernolibro de Thorbergur Thordarson ne gajnis multan popularecon malgraŭ ties konscienca prilaboro. La libro de Magnús Jónsson do bonvene aperas kaj des pli tiel, ĉar ĝi estas vere taŭga lernolibro por komencantoj kaj bone adaptita al la bezonoj de ordinara lernanto. Esence ĝi estas islandlingva adapto de la lernolibro de Henrik Seppik kaj Ernfrid Malmgren, *Sistema kurso de Esperanto*, kun dissemigitaj aldonoj specialaj por la islanda eldono. Laŭdinda estas la aperigo de la rezolucio de la Generala Konferenco de Unesko pri Esperanto, fine de la libro. Malgranda vortaro Esperanta-islanda kompletigas la lecionaron.

B. R.

KANTOJ POR LA PACO*. Poemaro originale verkita de Canko Murgin, Dua kompletigita eldono 1957, Sofio. Multobligita. 26 paĝoj.

Jen fasko de tendencaj kantoj dediĉitaj de la aŭtoro al la "porpacaj batalantoj". Lerte faritaj ili disvolvas temojn de trosimpligo, kiel ja plej bone taŭgas por fervorigo. En la sankta fajro de la porpaca batalo la "esperantisto neŭtrala / estas danĝera minaco". Malgraŭ tiaj nekompromisaj asertoj oni iel ŝatas la entuziasman spiriton de la poemetoj, — eble pro la sincero, kiun spiras ĉiu verso. Ne temas pri poezio, sed la aŭtoro estas lerta versfaranto, kiu bone regas nian lingvon.

B. R.

**Riĉigu
vian spiriton:
Aĉetu librojn**

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1958

Stato je la 31-an de aŭgusto 1958

Konkurso I			
	Kvoto	Poentoj	%
Lando			
1. Brazilo	7011	7395	105.47
2. Pollando	6150	6395	103.98
3. Germanujo	6865	6471	94.26
4. Nederlando	5567	5079	91.23
5. Svedujo	6945	6290	90.57
6. Francujo	7647	6807	89.02
7. Britujo	6963	6021	86.47
8. Usono	3225	2680	83.10
9. Danlando	2743	2278	83.05
10. Hispanujo	2508	1989	79.31
11. Svislando	2185	1705	78.03
12. Belgujo	1907	1437	75.35
13. Norvegujo	2144	1556	72.57
14. Finnlando	2765	1915	69.26

15. Italujo	4030	2745	68.11
16. Jugoslavio	3800	2140	56.32

Konkurso II

	Kvoto	Poentoj	%
Lando			
1. Portugalujo	560	615	109.82
2. Aŭstralio	1228	1260	102.60
3. Izraelo	240	240	100.—
4. Kanado	440	430	97.73
5. Sudafriko	235	215	91.49
6. Japanujo	1280	1150	89.84
7. Aŭstrujo	1505	1345	89.37
8. Novzelando	955	825	86.39
9. Islando	315	270	85.71
10. Maroko	659	457	69.35
11. Urugvajo	414	275	66.43
12. Argentino	1005	595	55.22

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO
N-ro 308

La 1-an de septembro 1958.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aŭgusto kaj ankaŭ por komparo je la fino de aŭgusto 1957 :

	1957	1958
Asociaj membroj	13289	12949
Individuaj membroj		
MJ	786	733
MA	5387	4773
MS	665	524
Pat.	5	5
DM	299	306
HM	52	46
JMJ	14	15
JMA	96	94
	7200	6496
	20740	19445

- 499 Costantini, S-ro L., Milano, Italujo.
500 Scuola Tecnica Commerciale, Milano, Italujo.
501 Zacchè, S-ro Fernando, Mantova, Italujo.
502 Bogdan, S-ro Inĝ. Jerković, Sarajevo, Jugoslavio.
503 Leenhard, S-ro A. A., Bussum, Nederlando.
504 Prins, Prof. Mr. D-ro J., Utrecht, Nederlando.
505 Azevedo, D-ro Celestino, Vila Real, Portugalujo.
506 Carrfors, S-ro Helge, Bromma, Svedujo.
507 Carrfors, S-ino Solveig, Bromma, Svedujo.
508 Söderberg, S-ro K., Upsala, Svedujo.
509 Peixoto, S-ro O., Niteroi, Brazilo.
510 Varanda, S-ro José, Petropolis, Brazilo.
511 Verde, D-ro Edmundo Vila, Arauama, Brazilo.
512 Bevan, S-ro Geoffrey, Wrexham, Britujo.
513 Joly, S-ro Romano, Dolisie, Franca Afriko.
514 Rizzo, D-ro Pietro, Catania, Italujo.
515 Rossetti, S-ro Fulvio, Venezia, Italujo.
516 Topi, S-ro L., Cremona, Italujo.
517 Kessel, S-ro A. P. van, Rotterdam, Nederlando.
518 Lind, S-ro M., Trollhättan, Svedujo.
519 Stenström, F-ino Signe, Broddar, Svedujo.
520 Forsberg, S-ro Stig. Otto, Oslo, Norvegujo.
521 Timponi, D-ro M, Rio de Janeiro, Brazilo.
522 Lassen, S-ro Aŭg., København, Danlando.
523 Krajzl, S-ro J., Sarajev, Jugoslavio.
524 Gorbattoff, S-ino Alička, Oujda, Maroko.
525 Krippner, S-ro Walter, Erfoud, Maroko.
526 Berry, S-ro Jay, Seattle, Usono.

DELEGITOJ

Brazilo

- Curitiba** (Parana) FD (fervojoj) : S-ro Leonidas Silva, fervojisto, Trav. Rosenau 471, Ahu Decima.
Petrolina (Pernambuco) D : S-ro Nelzito Santos, lingvinstruisto, Strato Cel. Marcelino Santana N-ro 5.
Rio de Janeiro FD (instruado) : S-ro Albertino Alves de Almeida, militisto, Ministerio da Aeronautica, 3^a Andar - DP/2.

Britujo

- Scarborough** (Yorkshire) D : vakas.

Francujo

- Blaincourt par Brienne la Château** (Côte d'Or) D : S-ro Reinier de Kogel, terkulturisto.
FD (religiaj aferoj) : la D.

Germanujo

- Fürth** (Bayern) VD : S-ro Hermann Wagner, studkonsilanto pensiuliĝinta, Keplerstr. 87.
Mosbach (Hessen) D : S-ro Edmund Kuhn, romkatolika pastro.
Neinstedt/Harz Kr. Quedlinburg D : S-ro Johann Haupt, instruisto, Thalesenstr. 11.
Oberstdorf D : vakas.

Havajo

- Wahiawa**, (Oahu) D : S-ro Bunnie J. Chambers, radioteknikisto aviada, 1740 Nakula St.

Hindujo

- New Delhi** FD (ĵurnalisto) : S-ro Veerendra Adhiya, ĵurnalisto, Prerna, Satnagar.

Hispanujo

- Tarrasa** FD (ĉarpentado) : vakas.

Hungarujo

- Miskolc** (Borsod vm) FD (poŝto), F-ino Márta Vári, poŝtoficistino, Széchenyi u. 6.11.20.

Jugoslavio

- Beograd** (Srbija) FD (instruado) : vakas.
FD (librotenado) : S-ro Dragomir Arsenijević, ĉeflibrotenistaro, strato Hadži Prodanova 4.
FD (turismo) : S-ino Nedeljka Subotić, ekonomiistino, Hadži Djerina 11/1.

- Pula** (Istra) D : vakas.

- FD (filatelo) : vakas.

- Zrenjanin** (Vojvodino) D : S-ro K. Ference Lehotkay, radio entrepren-direktoro, Petefieva 27.

Nov-Zelando

- Wellington** FD (scienco kaj filozofio) : S-ro Jozefo Major, ŝtatoficisto, 14 Buchanan St.
FD (studentaj aferoj) : S-ro Iain Chisholm, studento, 28 Oriental Terrace.

Svedujo

- Nora Stad** (Västmanland) D : vakas.
FD (kristanismo) : vakas.

Usono

- Davidson** (North Carolina) D : D-ro Howard French, profesoro, P.O. Box 201.
FD (universitataj aferoj) : la D.
Newark (New Jersey) D : vakas.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

- 495 Zuhlke, S-ino Clara Alvina J., Rio de Janeiro, Brazilo.
496 Bador, F-ino Y, Tarbes, Francujo.
497 Goppel, S-ro Ludwig, Regensburg, Germanujo.
498 Cassinis, S-ro Inĝ. Mario, Novara, Italujo.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

- Jalowski, F-ino Ilse Erna, São Paulo, Brazilo.

DONACOJ AL LA GENERALA KASO

- R. Barta, Usono 6.56 gld.; N.N. en V, Nederlando 5.- gld.; Kongresano en Mainz 1.52 gld.

FONDAJO ZAMENHOF

- Antaŭa sumo : 4260.77 gld.
Novaj kontribuoj : Grupo Gelsenkirchen-Buer, Germanujo 27.14 gld.; Grupo Wattenscheid, Germanujo 9.05

gld.; Ksenia kaj Arthur Malmkvist, Svedujo 10.80 gld.; F.V. Nat. Svanholm, Svedujo 7.34 gld.; Sven Möllestad, Svedujo 5.14 gld.; F-ino M. Meijwes, Nederlando 10.- gld.; Hector Castel, Belgujo 7.58 gld.; F-ino O. Stempel, Aŭstralio 17.- gld.; Joh. E. Falk, Usono 15.20 gld.; D-ro Howard French, Usono 19.- gld.; H. E. Dreyer, Usono 19.- gld.; D-ro Edmund A. Bartsch, Usono 11.40 gld.; Robert Blackstone Usono 3.80 gld.; D. E. Parrish, Usono 7.60 gld.; F-ino Yolanda de Araujo Costa, Brazilo 28.01 gld.; S-ino Schäfer, Danlando 5.50 gld.; Mijo Majcenovič, Jugoslavio 6.- gld.; Bruselanino, Belgujo 37.78 gld.; H. V. Rasmussen, Danlando 5.45 gld.; A. Hoekstra, Nederlando 10.- gld.; F-ino L. Weißen, Nederlando 5.- gld.; N.N. en V., Nederlando 10.- gld.; S-ino Alice Maier-Bevel, Kanado 11.56 gld.; F-ino Lidya Neridami, Italujo 12.- gld.; S-ro Böcker, Germanujo 3.83 gld.; S-ino Sara Dorin, Argentino 3.- gld.; Leander Tell, Svedujo 6.43 gld.; Ges. Koudijs, Nederlando 61.53 gld.; Gunnar Winnerhall, Svedujo 3.67 gld.; Jan de Vries, Nederlando 10.- gld.; S-ino A. Hetterschij—v. Duyn, Nederlando 10.- gld.; Gabriel Mora, Hispanujo 7.20 gld.; M. Rinz Maza, Hispanujo 1.80 gld.; S-ro Salvador Martínez 0.72 gld.; E. Tudela, Hispanujo 3.60 gld.; "Supozante ke vi plej bone povas honori Prof. D-ro Ivo Lapenna, per oferi por la Fondaĵo-Zamenhof, mi rekomendas tial, tiom eble plej subteni ĝin. Se vi ankaŭ opinias tiel, bonvolu tiam tuj agi same" 15.- gld.; Ing. K. J. Moberg, Svedujo 14.69 gld.; Prof. Yagi, Japanujo 112.80 gld.; F-ino Zandrén, Svedujo 216.75 gld.; Kolektitaĵ en Mainz 592.75 gld. Entute: 5629.69 gld.

La Zamenhof-jaro rapide alproksimiĝas. Larĝe kontribuu, por ke ĝi estu brila!

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.
M. H. VERMAAS,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgarujo. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

Por restarigo de esperantista lernejo ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon. Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj, diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

La Navigantoj, Örebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkoston kores-

pondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkuponon — se havebla — vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

Unitarismo — Realigita Homaranismo. Mendu la ĵus aperintan 60-paĝan libron, kiu priskribas la kredon de unitaranoj kaj la realigon de la religiaj ideoj de Zamenhof; 11 steloj. Ni ankaŭ reeldonis "Life of Zamenhof" (Privat). 10 steloj. Pago al niaj perantoj en via lando eblas, Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono Cunningham 4487.

Vokado Tutmonda grandskala. Ni sendos specialan poŝtkarton al ĉiuj helpantoj por ke ni pruvu la esperantan valoron. Sendu revuojn, librojn (precipe religiajn) ktp. al Adventista Teologia Fakultato, Ena Esperanto Klubo, Catende — Pernambuco, Brazilo.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Gejunuloj! Plurlingva revuo publikigas senpage vian korespondpeton. Montro la efikon de Esperanto por korespondemuloj! World Youth, Benczur utca 34, Budapeŝto VI, Hungarujo.

Kristanan Misiadon deziras multaj. Helpon donas: Albin Johansson, Brasagatan 6 B, Höganäs, Svedujo. Respondkuponon dezirata.

Interŝanĝas poŝtmarkojn tutmonde kvanton kontraŭ kvanto. D. J. Haverman, G. v. Amstelstraat 121, Hilversum, Nederlando.

Esperanto parolata. Adresaro de entreprenoj, kiuj povas servi klientojn per Esperanto, mendebla ĉe S-ro Rétot, 162 boulevard Aristide Briand, Montreuil (Seine), Francujo: du respondkuponoj (du ekzempleroj: tri rpk.)

Internacia Esperanta Ludkartaro, Budapeŝto-Eldonon kaj Nacitipajn Ludkartojn akirus aĉete/interŝanĝe. S-ro S. W. Ahlm, Nytorggatan 23 B, Stockholm Sö, Svedujo.

Katolika Esperantisto! Ĉu vi jam estas membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)? Jarko-

tizo ned. guld. 6.— = 24 steloj aŭ egalvaloro. Membroj ricevas la monate 20-paĝan Esperanto-revuon ESPERO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Esperanto-Klubo ĉe Pafawag-Wroclaw, str. Gwidnicka 39/I, Pollando, deziras korespondi, interŝanĝi bildkartojn, librojn, revuojn, gramofondiskojn kaj esperantajjn kun la tuta mondo. Respondo garantiata. Fine de novembro okazos letervespero. Amase sendu leterojn, bildkartojn kaj esperantajjn.

Mi deziras interŝanĝi, litovajn alumetglumarkojn kun aliaj landoj en la sama valoro 1 : 1 (peco laŭ peco) Adreso validos ĝis 1960 Kiela Alfonsas, Koumas 6, USSR-Litovio.

Svaĉina Fran, del. de U.E.A., skribkursmetoda instruisto de Esp., Lanžhot, okres Brěclav, Ĉeĥoslovakio, korespondas pri: esperantigo de junularo jam de infanaj jaroj; metodo kiamaniere limigi fumadon kaj per tiel ŝparita mono subteni junularon; eterna homa vivo, instruado per skriba kurso.

Emil Keremidčiev 18 jara deziras korespondi. Sofio, str. Hristo Botev 98, Bulgarujo.

UEA-Jarlibroj malnovaj serĉataj! por grava propagando. 1935 Suplemento; IEL 1937, 1940 ĝis 1945 inkluzive, UEA depost 1939 inkluzive. Cerri, C.P. 159, Biella, Italujo.

"Por ĉiu malsano". Herbeton-recepton sendas ing. B. Molnar, Naprstkova 9, Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Aldonu 2 respondkuponojn.

Por la
ZAMENHOF-JARO :
Biografiaj Informoj pri
D-ro L. L. Zamenhof
Eldonita de C.E.D.

Sendas la C.O. kontraŭ 1 resp. kup.

Arta Fotokarto de
D-ro L. L. ZAMENHOF

Aperos en Novembro
Prezo : 0.20 gld.; 80 steloj.
Eldonas U.E.A. Mendu jam nun !

VARBU REKLAMOJN
POR JARLIBRO 1959

La Centra Oficejo povas akcepti
ilin ĝis la komenco de Novembro

Gratulu por
Kristnasko kaj la Nova Jaro
per
„Malnovaj Holandaj Majstroj”

12 diversaj reproduktaĵoj de famaj pentraĵoj,
delikate presitaj kun esperanta teksto.

Serio de po 6 diversaj duoblaj kartoj kun kovertoj :

3.— gld; 12 steloj

MENDU NUN ĈE U.E.A. !

BELARTO

speciالا aldono al la revuo ESPERANTO

LITERATURO

PENTRARTO

MUZIKO

LINGVISTIKO

Prezo: 2,75 gld. (11 steloj) por membroj

3,25 gld. (13 steloj) por membroj

72 p.

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

Per kio la infanoj ludas tra la mondo

Konkurso por amatoraj kaj profesiaj fotografistoj
Limdato: 31-an de decembro 1958

Partoprenu la konkurson!

Atentigu la fotografistojn de via regiono!

Petu regularon ĉe :

Etnografia Muzeo

Internacia Salono de Fotografo 1959 Neuchâtel
(Svislando)

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:

Administracio:

7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Redaktoroj:

AULD kaj ROSSETTI

kun multaj kunlaborintoj
320 p., bindita

prezo: 10 ned. gld. (40 steloj)

Unika verko pri grava literaturo

Eldona Fako de U.E.A.

Mendu de U.E.A

Retoriko

kun aparta konsidero al esperanta parolarto

de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita
kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo: 11.— gld. bindita

9.— gld. broŝurita

Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe la aŭtoro



Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam